

1975 oktobro

68-a jaro

n-ro 838 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Akropolo estas nur unu
el la ravaĵoj de Ateno



Vi trovos

antaŭ ĉio, ke al ĉi tiu numero estas aldonitaj du enmetaĵoj (Unua Bulteno de la venontjara UK en Ateno kaj la Aliĝilo por la 62a UK en Rejkjaviko en 1977), kiujn tamen klopodu ligi al du diversaj kongresoj. Efektive, la Unua Bulteno de la 61a UK (kune kun sia tuta beleco donacita de la Greka Nacia Turisma Oficejo) devis akompani nian septembran numeron, sed tio ne okazis pro malfrua livero el la greka ĉefurbo al Roterdamo.

Cetere, parolante pri malfruoj . . . (Ne, ne! Ni jam promesis ne plu trakti tiun temon ĉi-loke). Ĉar kelkaj antaŭaj numeroj, kiuj preskaŭ plaĉis al la redaktoro, ne plaĉis al legantoj, restas por esperi, ke ĉi tiu numero, kiu ne plaĉis al la redaktoro, — renkontos aprobon de legantaro. Tamen, havu bonvolon noti, ke ne estas aparte amuze produktadi revu-numerojn, kiuj eĉ propran guston de la produktanto ne kontentigas. Nu, plenigita la spaco!

Enhavo

- 161 Parolado de H.R. Tonkin en Finnlando: Helsinki kaj la Movado
- 163 Post la 60a UK: La membraro kundirektas (d-ro W. Bormann)
- 164 Tri someraj aranĝoj (Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsingör, La 43a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, La 15a Internacia Infana Kongreseto)
- 165 Bulonja Deklaracio datrevenas: Bulonjo hodiaŭ (ul), La 48a Kongreso de SAT: Sukcese en Hago (sm), Komisiito pri sporto
- 166 Belartaj Konkursoj 1975, Originala poezio, Unua premio: La najlo de la hoĝo Nasr' Eddin (Stojan Ĝuĝev)
- 167 Belartaj Konkursoj 1975, Originala prozo, Dua premio: Por kapti ŝteliston (Ray Smith)
- 168 Kiel oni aktivas en Tallinn (Benita Kärt), Sennacieca Revuo 1975, Monda Karuselo
- 169 Recenzoj ("Mia verda breviero", "Enciklopedia vortaro Esperanta-jida", "Iracema"), Laste aperis . . .
- 171 TEJO-paĝo: Lingvo kaj politika subpremado: TEJO en Coimbra, Nederlanda Esperanto-Junularo: Ĉu inspiro?, Junulara semajnfino en Danlando: Venu denove!
- 172 Kongresa Komunikado: Novaj pri la 61a Universala Kongreso en Ateno
- 174 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 176 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 177 Oficiala informilo
- 178 Kotizo-tabelo por 1976, Nekrologoj (L. Apcher, O. Avsec, O. Berman, G. Bruno, P. Haas, H. Kocaman, B. Migliorini, F. Mueller-Sorau, A. Skyberg, J. Telling, L. Tressel, H. Wagner)
- 179 Anoncetoj
- 180 Anonco

La kovrilo

Al la kongresurboj oni kutime pro kongresoj venas. Ateno estas escepto! Ankaŭ tien multaj iros pro la 61a Universala Kongreso, sed malmultaj — eble neniu — iros tien nur pro la Kongreso. Ĉiuj kombinos la partoprenon en la Kongreso kun pilgrimo al Greklando, al Helenujo al kiu la moderna civilizo neniam sukcesos sufiĉe danki. En ĉi tiu geometria erao ni iru vizite al la pura belo de la Perikla Akropolo kaj la senkompara majesto de la Fidia Partenono, salutanta vin de nia kovrila bildo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford OX4 4AA, Britio; tel. (0865) 47408.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Helsinki kaj la Movado

Inter la 25a de septembro kaj la 16a de oktobro, la prezidanto de UEA faris viziton al Skandinavio, laŭ invito de tieaj movadaj kaj ekstermovadaj instancoj kaj institucioj. Dum ĉi tiu vizito, d-ro Tonkin faris ĉ. 15 paroladojn kaj prelegojn, kiuj traktis diversajn aspektojn de la Esperanto-movado (planado por la estonteco de la Movado, la nuna stato de UEA, Financa Programo kaj eksteraj rilatoj de UEA, lingva diverseco kaj nia estonta agado). Kelkaj el tiuj prelegoj okazis en universitataj aŭ aliaj publikaj institucioj en Finnlando kaj traktis pli specifajn temojn (poezia lingvo en Esperanto, lingva diverseco kaj lingva unueco) aŭ estis tute fakaj (uzado de alegorio kaj lingvo ĉe Spenser, supera edukado en Usono). Tamen, ankaŭ tiaj prelegoj plej ofte okazis en Esperanto kun traduko en la finnan. Dum la vojaĝo, kiu cetere inkluzivis ankaŭ mallongan viziton al Leningrado kaj paroladon en tiea Esperanto-klubo, okazis du gazetaraĵaj konferencoj kaj tuta aro da intervjuoj, kiuj rezultigis ĉ. 600 kolumnajn centimetrojn da gazetara teksto. El la prelegoj, okazintaj en Finnlando, Svedio kaj Danlando (en la ĉeesto de preskaŭ 1 300 personoj), nian intereson aparte kaptis tiu farita en la kadro de la Aŭtuna Konferenco de Esperanto-Asocio de Finnlando (la 27/28an de septembro en Kuhmo) kaj ni publikigas ĝin ĉi tie, post ioma koncizigo.

EN LA LASTAJ JAROJ montriĝis signoj, ke la nuna epoko en la historio estas unike favora al la ideo de internacia lingvo kaj tute speciale de Esperanto. Se oni rigardas la mondan situacion, oni vidas, ke, malgraŭ la ĉiama risko de milito, malgraŭ la multaj streĉitecoj, malgraŭ la perfortoj kaj ĉantaĝoj, oni pli multe interparolas ol interbatalas, pli multe celas pacajn ol militajn solvojn de mondaj problemoj. Nia movado, kiu celas interalie la proksimigon de la popoloj, devas bonvenigi tiun evoluon kaj fari sian eblon por akceli ĝin. La interbatalado ne bezonas komunan lingvon, krom eble tiun de la minacoj kaj la bonoj, sed la interparolado ja postulas ĝin. Ju pli multe la homoj alproksimiĝas, des pli forte sentiĝas la lingva problemo.

Antaŭenigi rilatojn inter ordinaraj civitanoj

La plej aktuala evento en la komuna strebado al malstreĉiĝo estis la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, kiu okazis ĉi tie en Finnlando antaŭ du monatoj, kaj kies Fina Akto estis subskribita de 35 registaroj eŭropaj kaj nordamerikaj. Tiu Fina Akto esprimas pli forte ol ĉiuj aliaj lastatempaj internaciaj interkonsentoj la deziron de la diversaj ŝtatoj fortigi la praktikan kunlaboron, kun la celo eviti militon kaj plibonigi la kvaliton de la vivo en la koncernaj ŝtatoj. Ĝi mencias tutan serion da kampoj sur kiuj oni celas pli intiman kunlaboron. La scienco kaj tekniko ricevas apartan atenton, sed alineoj estas dediĉitaj al plifaciligado de turismo, plimultigo de junularaj interŝanĝoj, antaŭenigo de kunlaboro inter edukistoj, kulturaj interŝanĝoj ktp. Temas, do, pri esprimita deziro antaŭenigi ne nur la kontaktojn inter ŝtatestroj kaj registaroj, sed ankaŭ la rilatojn inter la ordinaraj civitanoj de la diversaj landoj. Kvankam leviĝis voĉoj post la Konferenco, kiuj atentigis, ke la lipoj ne ĉiam ligiĝas kun la koro, la Fina Akto de la Konferenco de Helsinki donas al tiuj individuoj kaj organizoj, kiuj laboras por la

proksimigo de la popoloj, novan ĉarton: la ŝtatoj esprimis sian deziron praktike plifortigi siajn rilatojn. La neregistaraj organizoj kaj individuoj en la diversaj landoj akceptu tion kaj agu konsekvence.

Kvankam la konferenca dokumento ankoraŭ atendas sian plenumiĝon, ekzistas en nia moderna mondo multaj pli konkretaj ekzemploj de interŝtata kunlaboro plej intima. Oni eĉ povus diri, ke kunlaboro trans la naciaj limoj fariĝas ne la escepto sed la normo de la rilatoj inter ŝtatoj. Jam de multaj jaroj la instancoj de Unuiĝintaj Nacioj kviete kaj efike laboris sur multaj praktikaj terenoj, for de la pli videbla kaj foje malpli atingoplena areno de la Ĝenerala Asembleo kaj la Sekureca Konsilantaro. La Eŭropa Komunumaro estas eĉ pli elstara ekzemplo de la kapablo de la nacioj praktike kunlabori. Ĝi estas tia, cetere, tute senkonsidere pri niaj opinioj pri tiu kunlaboro, kaj ĝi estas bona ekzemplo de la intensiĝo de la internaciaj rilatoj sur ĉiu kampo.

Inter la diversaj problemoj, kiujn frontas la Eŭropa Komunumaro, estas tiu de la moviĝo de laboristoj trans naciajn limojn kaj tiu de la minoritatoj interne de la diversaj ŝtatoj. La Fina Akto de Helsinki dediĉas rimarkindan atenton al ambaŭ tiuj grupoj. Ĝi emfazas la rajtojn de minoritatoj al jura egaleco kaj al fundamentaj liberecoj. Ĝi donas specialan atenton al la infanoj de gastlaboristoj, al kiuj estu malfermaj la edukaj sistemoj de la landoj en kiuj la gepatroj laboras, kaj kiuj ankaŭ ricevu edukon pri la propraj kulturo kaj lingvo.

Pli vigla interesiĝo pri lingvaj demandoj

Estas strange, ke la diskutoj en internaciaj organizoj kaj senpere inter ŝtatoj, pri diversspeca kunlaboro, nur malofte pritraktas lingvajn demandojn. Kvankam la demando pri la relativaj rajtoj de la lingvoj estas ofta punkto de diskuto kaj disputo interne de internaciaj

organizoj, malofte tiu demando estas konsekvence aplikata al la praktikaj postuloj de la kunlaboro mem. Kvankam la dokumento el Helsinki ne estas vere escepto de tiu kutimo, estas rimarkebla en la teksto konsiderinde pli vigla interesiĝo pri lingvaj demandoj, ol oni trovas en multaj tiaj interkonsentoj. La lingva problemo leviĝas en la ĵus menciitaj sekcioj de la dokumento, kiuj pritraktas gastlaboristojn. Ĝi estas subkomprenebla en la sekcioj pri homaj rajtoj kaj pri minoritatoj. Sekve de simila rezolucio, akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en novembro, la dokumento rekte alvokas al akcelado de lingvolernado kaj faciligo de junularaj interŝanĝoj kun tiu celo.

La atento pri lingvoj en la Fina Akto de Helsinki eble ŝajnas eta afero sensignifa, sed ĝi estas simptomo pri kreskanta konsciiĝo pri la rajtoj de la diversaj lingvoj kaj iliaj parolantoj, kaj pri la netolerebla kaoso, kiun kaŭzas la diverseco de lingvoj sur la internacia tereno. Tiu konsciiĝo prezentas veran dilemon al la homoj. Unuflanke ili ekkomprenas, ke ĉiu homo havas egalan rajton utiligi sian gepatran lingvon en rilatoj kun alilingvanoj, kaj ke la diversaj lingvoj kaj kulturoj mem havas vivorajton iasence garantiitan en la juro de multaj ŝtatoj kaj en la Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Aliflanke ili komprenas, ke ĉiam kiam oni aldonas plian lingvon al la lingvoj jam oficialaj en difinita organizo, oni geometrie pligrandigas la problemon. La principo de lingva egalrajteco aplikata en la Eŭropa Komunumaro ne bone funkciis eĉ kiam estis nur kvar oficialaj lingvoj, sed jam, sub la aldona premo de la angla kaj dana, la oficistoj emas sopiri al tiu iama ora epoko kaj tremi antaŭ la eventuala aldono de la greka kaj la turka. Estas demando kiom longe la Komunumaro povos elteni sen profunda reaprezo de la tuta lingvodemando. Similaj problemoj kuŝas antaŭ la Unuiĝintaj Nacioj kaj preskaŭ ĉiuj ties specialigitaj instancoj.

La kopenhaga atentigo

En rezolucio, akceptita dum la 60a Universala Kongreso de Esperanto, la Komitato de UEA atentigis la Eŭropan Sekurecan Konferencon pri la komplikajtoj kiuj sekvas el la lingva diverseco. "La problemo de multlingveco", ĝi deklaris, "aparte akre aperas en la kampo de personaj kaj neoficialaj rilatoj," kaj ĝi plue konstatis, "ke justa, egalrajtiga kaj adekvata solvo de ĉi tiu problemo povas troviĝi nur en la ĝenerala adopto de internacia planlingvo, kiel jam dum jardekoj pruvis la ĉiukampa funkciado de la Internacia Lingvo Esperanto." Per tiu rezolucio ĝi diras klare al la reprezentantoj de la diversaj ŝtatoj, ke kunlaboro — almenaŭ tia kunlaboro kian oni priskribas en la Fina Akto — postulas interkomprenon. Tridek kvin ŝtatoj subskribis la Finan Akton. Inter si ili havas iom pli ol dudek naciajn lingvojn kaj amason da regionaj lingvoj. Kvankam estas bela gesto apogi la instruadon de fremdaj lingvoj — gesto kiun ni subtenu — oni ne solvos lingvajn problemojn de tiaj dimensioj per la apliko de tradiciaj solvoj, speciale kiam tiuj solvoj pli-malpli malsukcesis en la pasinteco. Kaj tion verŝajne komprenas tiuj politikistoj kaj ŝtatestroj kiuj dediĉis al la demando

ioman sian atenton. Kvankam kelkaj eble ankoraŭ opinias, ke ekzistas espero pri ĝenerala akcepto de unusola nacia lingvo por internacia uzado, la plejparto verŝajne kredas, ke lingvodiverseco estas la natura sorto de erarplena homo kaj akceptas ĝin kun sama trankvila animo kiel pluvan tagon dum ferio. Kelkaj eble scias pri la Internacia Lingvo; sed ĝenerale restas, spite al la bonaj klopodoj de la parolantoj de Esperanto, ankoraŭ granda senco pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj, inter niaj politikistoj.

Ni staras, do, antaŭ malferma pordo. La lingvaj problemoj multiĝas; oni esprimis deziron pri grandskala internacia kunlaboro; tiu kunlaboro jam rapide disvolviĝas en pluraj internaciaj organizoj. Sed ĉu ni estas en pozicio ekspluati la favorajn kondiĉojn?

Trarompi la fermitan cirkon

Ni kutimas argumenti, ke mankas financaj fortoj — kaj ni pravas. Sen ili ne eblas ellabori novajn organizajn formojn, fari novajn paŝojn, kiujn ni tiel urĝe bezonas. Ni varbas membrojn por havigi la financajn rimedojn por varbi membrojn; kaj tiu fermita cirklo ŝajnas neelirebla.

Karaj geamikoj, ni devas ĝin rompi: la tempo nun laboras por ni, sed la mondo ne atendas nin dum ni solvos niajn diversajn problemojn trankvile, kaj trankvile alpaŝos ĝin kun niaj ideoj. Ĝi fordrivos al aliaj malpli adekvataj solvoj aŭ, pli verŝajne, sinkos centimetron post centimetro en la marĉon de reciproka miskompreno kaj interakuzado.

Kaj mi opinias, ke ni kapablas rompi tiun fermitan cirkon, ĉefe per havigo de rimedoj el ekster niaj propraj rondoj. Kiel mi imagas tion? Nu, tio estos temo de aparta kunsido dum la nuna konferenco. Sed, mallonge dirite, la procedo postulas miaopinie kvar neprajn elementojn. Unue, ni difinu pli klare nian celon. Ni ĉiuj scias, ke ni laboras por la enkonduko de la Internacia Lingvo — sed kiel aspektos la mondo



La romantikeco de Kuhmo logis ĉ. 250 partoprenantojn en la Aŭtuna Konferenco de E-Asocio de Finnlando.

post tiu enkondukiĝo, sur kiuj kampoj la bezono plej forte sentiĝas, kaj kiujn kampojn ni unue alpaŝu?

Due, ni listigu kaj ekzameniu la nunajn organizajn kaj financajn rimedojn je nia dispono interne de la movado. Ĉu nia kapitalo estas plej bone uzata? Ĉu kuŝas homaj rimedoj neekspluatataj en lokaj grupoj aŭ movadaj instancoj? Ĉu ni plej bone utiligas niajn geamikojn kaj apogantojn en la publika vivo?

Trie, ni esploru manierojn pligrandigi tiujn rimedojn per turniĝo ekster la movadon. Ĉu ekzistas fondaĵoj, privatuloj, instancoj, kiuj povus helpi al ni — ĉu finance, ĉu home — aŭ kiuj pretus entrepreni taskojn kiuj povus nerekte helpi al ni? Ĉu ni povas malfermi kontaktojn kun tiuj eventualaj helpantoj? Plej grave — kaj tio kondukas al la kvara punkto —, ni ellaboru tre konkretajn planojn por nia estonta agado. Tiuj planoj efike rilatigu la finan celon (ne iun survojan celon aŭ iun celon tajloritan al niaj malaltaj aspiroj) al la efektivaj rimedoj nunaj kaj espereblaj rimedoj estontaj. Tiuj planoj havu lokon por ekstera subteno, al kiu ni dediĉu apartan atenton; ili enhavu limdatojn, buĝetojn, laŭŝtupajn procedojn. Kaj ili estu faritaj saĝe, kuraĝe kaj klarvide. Ĉiuj niaj homoj estu streĉitaj ĝis maksimumo, kaj ĝis maksimumo ni utiligu iliajn talentojn.

Unueco kaj kunlaboremo estas plene esencaj

Kiaj problemoj povus ekesti en tiu procedo? Unue, ĝi postulas kunlaboron ne nur interne de la diversaj Esperanto-organizoj, sed ankaŭ interorganizan. La unueco kaj kunlaboremo estas do plene esencaj. Ni ne povas permesi, ke rivalecoj, problemoj de personecoj, malestimoj intervenu. Due, ĝi postulas aktivan partoprenon en la planado je **ĉiuj niveloj**. Ni **komune** decidu nian estontan vojon kaj ni **komune** sekvu ĝin. La plej bonaj planoj estas tiuj, kiuj ĝuas ĝeneralan subtenon, kaj la plej bona vojo al tiu subteno estas la efektiva partoprenigo de ĉiuj tavoloj. Unu el la rezolucioj de la 60a UK pritraktis la demokration en niaj organizoj. Mi forte rekomendas al vi ĉiuj ĝiajn trastudon kaj aplikon.

Trie, la unueco de la Movado, kaj sekve la kapablo plani kaj kunlabori kaj kune alpaŝi la publikon, dependas de reciproka fido: fido al UEA, fido de UEA al la landaj asocioj, fido de ni ĉiuj al la esencaj deco, saĝo kaj bonvolo de ĉiu unuopa Esperanto-parolanto. Neniu el ni estas nemalhavebla, sed ĉiuj ni havas nian utilon, povas ludi nian rolon. UEA mem devas esti preta larĝe aŭskulti sian membraron; ĝia gvidantaro devas regule ŝanĝiĝi kaj renovigi sin — kaj, plej grave — ĝi devas resti fidela al la propraj principoj: respekto al la homaj rajtoj kaj subteno al la principo de politika neŭtraleco. Ni enpenetros la diversajn politikajn mediojn nur se ni ne identiĝos kun tiu aŭ alia partio, tiu aŭ alia politika vidpunkto; ni restos unuecaj nur se ni evitos preni starpunkton nete politikan. Samtempe ni tamen laboru por la plibonigo de la homa kondiĉo, kaj ni ne timu tion deklari. "Jen la vojo nun atendas," diras la bardo, "pado nova pete gestas." Ni sekvu ĝin, geamikoj, kun plena kuraĝo.

Humphrey R. Tonkin

POST LA 60a UK:

La membraro kundirektas

INTER LA NOVAJ ARANĜOJ de la 60a Universala Kongreso en Kopenhago unu elstaris jam pro sia nekutima aspekto: salono kun diskutkunveno, sed ne en la tradicia dueco de agantoj sur la scenejo kontraŭ ĉeestantoj en la sidvicoj. Male, estis unuopaj tabloj, al kiuj koncentriĝis la laborantoj, ĉiuj al la sia. Tiu diserigo okazis por ankoraŭfoje pligrandigi la demokratecon de la Asocio. Ofte individuoj en la Movado sentis malfacilojn prezenti siajn ideojn al gvidaj organoj kiel Komitato aŭ Estraro, kaj multaj ne ŝatas paroli en la publik-eco de granda salono kun centoj da aŭskultantoj. Tiajn barojn evitis la nova aranĝo.

Prepare al tiu kunveno, artikolo en la kongreslibro skizis la strukturon de UEA. Principe regas la modelo de reprezenta demokratio, simila al tiu de federaciaj ŝtatoj kiel Svislando aŭ Federacia Respubliko Germanujo, kaj fakte ekzistas — kiel montris la artikolo en la kongreslibro — pluraj ebloj por unuopuloj influi la vojon de la tutmonda Asocio. Sed aldonaj komunikokanaloj de la membraro al la decidantoj estas ĉiam bonvenaj.

La organizinto de la diskutkunveno ofertis 20 temojn, pri kiuj informis ŝildoj alte super ĉiu tablo sur stabletoj. Rondirante, ĉiu diskutemulo elektis sian preferon. Tamen, 9 proponoj ne trovis eĥon: arbitraciado en UEA, Centra Oficejo, membrokotizoj, kongresurboj (Ĉu la tiurilataj decidoj de la gvidorganoj trovas apogon aŭ ekzistas malkontento ekz. pri la loko de niaj kongresoj en la mondompartoj?) kaj aliaj, inter tiuj ankaŭ la propono, diskuti pri plej bona konsisto de la estraro de UEA (ekz. laŭ nacioj aŭ lingvogrupoj, kiun problemon iuj levis post la pasintjaraj elektoj). Jam tiu neelekto malkaŝe montras, kiuj estas la vere interesaj temoj por la "silenta amaso": niaj kutimaj zorgoj. Ili formas la katalogon de la pritraktaĵoj: delegitaj servoj, Esperanto-politiko — t.e. kiun vojon la Movado prenu por sukcesigi Esperanton, do apliko de la vorto "politiko" en la senco de PIV: "maniero, kiel tiuj aferoj (scienco aŭ arto de regado de ŝtato) estas regataj"; politiko do kiel scienca, eĉ arta maniero regi grandan socian organismon —, financoj, informado, konferencoj, kursoj, revuo *Esperanto*, Statuto de UEA, TEJO, turismo, volontula servo. Entute do pritraktis konkretan kampon 11 diskutrondoj. Po unu el la kun- sidintoj buŝe raportis poste al la pleno kaj la gvidanto (vicprezidanto de la Asocio) notis la rezultojn; 5 rondoj liveris eĉ skriban protokoleon.

Sian **delegitan reton** UEA devus pli ofte kontroli. Delegito devas esti lingvoscia, korpe ankoraŭ servpova kaj laborpreta; almenaŭ ĉiun kvinan jaron pridemandado necesas. La **Esperanto-politiko** baziĝu sur kvar prioritataj taskoj: interesigi politikistojn, krei vastan

favoron por Esperanto en la publiko kaj aparte inter sciencistoj, pligrandigi nian instruistaron, kunordigi ĉiujn agadojn pere de UEA. La diskutantoj pri **financoj** rekomendis sekciigi nian laboron en pure movadajn aferojn (kaj por ili akiri subvenciojn de edukaj centroj) kaj en komercan ekspluatadon de agrablaĵoj pro Esperanto i.a. en turismo, filatelo, libro-vendado. La tablo pri **informado** akcentis, ke informadi estas ĉies tasko, sed ke UEA eldonu la necesajn materialojn, restarigu la Internacian Gazetaran Servon kaj zorgu per alvokoj k.s. pri diskonigo de esperantaĵoj (ekz. prospektoj), por ke la membroj ekagu. Rilate **konferencojn** esperantistoj uzu la fervojan rabaton, havu vastan elekton inter pluraj antaŭ- kaj post-kongresoj kaj nepre klopodu pri kunlaboro kun ne-esperantistaj internaciaj organizaĵoj. Por subteni aranĝantojn de **kursoj** por plenkreskuloj, UEA aperigu libron kun la plej oftaj vortoj. La revuo *Esperanto* estis rekonita kiel la plej altnivela gazeto en la internacia lingvo, sed ĝi enhavu pli da artikoloj pri virinaj aferoj, por komencantoj kaj de neeŭropanoj. La diskutrondo pri la **Statuto** rekomendis, ke la artikoloj pri neŭtraleco kaj la gvidprincipoj restu senŝanĝaj, sed ke

ĝenerale diskutataj ideoj (i.a. kvarjara oficperiodo, prezidanto nur unufoje reelektebla, faciligita aliro al la Komitato por pli malgrandaj landaj asocioj) eniru novformulon. La interesitoj pri **TEJO** pritraktis la problemon de junaj membroj en lokaj grupoj, kaj konstatis la neceson de helpo flanke de pliaĝuloj kaj maljunuloj. La rondo pri **turismo** rekomendis kunligi esperantistajn interesojn kun la komercaj celoj de vojaĝagentejoj; esperantisto ĉiam portu — precipe en eksterlando — la verdan stelon kiel rekonilon. Ĉe la tablo **volontula servo** informoj estis donitaj por antaŭenigi tiun gravan iniciaton.

Notoj kaj raportoj de la novstila diskutkunveno estis unufoje temo de la estrarkunsido de UEA la 29-an de julio 1975 en Kopenhago. La plej gravaj rezultoj estas nun publikigataj ĉi tie. Ĉio menciita atingis la koncernan estraranon aŭ la Centran Oficejon por plua konsidero. Tiel la membroj povas esti certaj, ke la proponoj lanĉitaj en la sentimige malgrandaj rondoj dum la diskutkunveno de la 60a Universala Kongreso trovas sian eĥon kaj efikas kiel kundirektado de la vojo de UEA pere de ĝiaj membroj.

D-ro Werner Bormann

Tri someraj aranĝoj

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ EN HELSINGÖR

LA INTERNACIAJ FERIAJ Kursoj en Helsingör, Danlando, okazis de la 20a ĝis la 26a de julio sub la gvido de s-ro Gösta Persson el Helsingborg, Svedujo. Partoprenis 118 personoj el 16 landoj. La partoprenantoj profitis el diversnivela Esperanto-kursoj, gvidataj de elstaraj instruistoj, antaŭtagmeze, kaj ĝuis instruajn kaj distrajn aranĝojn posttagmeze (ekskursojn, prelegojn, amuzojn). En belega festvespero la tuta kursanaro omaĝe adiaŭis gesinjorojn Friis, kiuj dum jardekoj modele kaj sinofere prizorgis kaj gvidis la kursojn, sed nun transdonis la torĉon al aliaj. Sub la gvido de s-ro L. Friis la Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsingör fariĝis nekontesteble unu el la plej sukcesaj kaj fidindaj entreprenoj por la progresigo de Esperanto. Al ges-roj Friis, s-ro G. Persson, ĉiuj instruistoj kaj partoprenintoj en la Kursoj 1975 mi sendas korajn salutojn kaj varmajn dankojn pro neforgesebla kunestado.

Thórey Kolbeins-Ragnarsson, Islando

LA 43a KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

INTER la 20a kaj 26a de julio 1975, en Hillerød, Danlando, kun partopreno de 64 personoj el 11 landoj, okazis la 43a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, tradicia jara aranĝo de Ligo Internacia de Blindaj Espe-

rantistoj, kunlaboranta faka asocio de UEA. La ĉefa kongresorganizado estis s-ino Zlata Zacho el Kopenhago. Laŭ s-ino Zacho, Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj ne celas nur disvastigi Esperanton inter la blinduloj, sed ankaŭ pere de Esperanto kontribui al pli rapida kaj pli pozitiva solvado de blindulaj problemoj ĝenerale. Tio ĉi plene manifestiĝis ankaŭ dum la sukcesa aranĝo en Hillerød, kie oni okazigis prelegojn kaj diskutrondojn ekz. pri integra edukado de blindaj infanoj kun la ĝenerala junularo. Okazis ankaŭ aparta prelego lige al la 150-jara datreveno de Braille pri diversaj aplikoj de la brajla skribo. La kongresanoj vizitis plurajn danajn instituciojn por blinduloj, interalie, ŝtatan presejon kaj bibliotekon por blinduloj, kie oni povis konatiĝi kun la produktomaniero de brajloskribaj libroj, inkluzive de de la plej modernaj atingoj sur tiu kampo — komputila presado de brajlaj libroj.

La Kongreso akceptis tri resoluciojn, el kiuj la unua koncernas la integran edukadon, la dua informadon de la ĝenerala publiko pri la socia pozicio de blinduloj, kaj la tria pledas por vastigo de spertoj en skandinaviaj landoj, kie la poŝto kaj bankoj uzas la brajlan skribon por administri la kontojn de siaj blindaj klientoj.

LA 15a INFANA KONGRESETO

LA 15a INTERNACIA Infana Kongreseto ankaŭ ĉi-foje okazis paralele kun la 60a UK, en Hellerup apud Kopenhago, en la sama loko (Bjørns Internationale Skole), kie en 1956 okazis la 1-a Internacia Infana Kongreseto. Ĉi-jare la Kongreseton partoprenis 25 infanoj el 8 landoj, kaj ĝia gvidantino estis Karin Bjørnsby, kiu en 1956 organizis la unuan kongreseton.

BULONJA DEKLARACIO DATREVENAS:

Bulonjo hodiaŭ

La 60a UK en Kopenhago memorigis pri la Unua Kongreso, okazinta antaŭ 70 jaroj en Boulonje-sur-Mar. Kompreneble, tio signifas ankaŭ la 70an datrevenon de la fama "Deklaracio pri Esperantismo", kiu estis akceptita dum tiu Kongreso kaj kiu restas aktuala ĝis la nuntempo. La Deklaracio difinas interalie, ke "Esperanto havas nenian personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo", ke la "Esperantismo", t.e. la celado disvastigi la uzon de Esperanto, ne respondecas pri iuj aliaj ideoj aŭ espero, kiujn persono ligas kun la lingvo, kaj ke esperantisto rajtas sin nomi ĉiu, kiu scias kaj uzas Esperanton por kiu ajn celo.

La ĝis nun plej ofte konsultita versio de la Deklaracio, en *Originala Verkaro*, bedaŭrinde enhavas kelkajn erarojn (ekz. la kuriozan mislegon, ke "teoria disputado kondukos al **nescio**", anst. nenio). Tamen, nun, en *Esperanto en perspektivo*, p. 418 k.sekv., oni denove havas je dispono la aŭtentikan tekston de la Bulonja Deklaracio.

LA 48a KONGRESO DE SAT:

Sukcese en Hago

SAMTEMPE kun la 60a Universala Kongreso en Kopenhago, inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto 1975, en Hago, Nederlando, okazis la 48a Kongreso de Senacieca Asocio Tutmonda (SAT). Ĉi tiu grava manifestacio de la internacia Esperanto-movado ĉi-jare kunvenigis ĉ. 300 partoprenantojn el 19 landoj. La Kongreso okazis sub la patroneco de la iama ĉefministro de Nederlando, d-ro W. Drees, kiu estas membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.



SAT-Kongreso en Hago: Ĉu preteco kunlabori kun UEA?

La nekonvenecon de dimanĉa mateno por solenaj inaŭguroj de esperantistaj aranĝoj (ankaŭ Universalaj Kongresoj) SAT ĉi-foje aparte rimarkis, ĉar al la inaŭguro de la Kongreso en Hago venis neniu ekstermovada gasto. Komisiite de la Estraro de UEA, en la nomo de la Asocio la SAT-Kongreson salutis s-ro van Woerden el Hago. Estas menciinde, ke la prezidanto de SAT, s-ro P. Levi, en sia inaŭgura parolado eldiris ankaŭ ĉi tiun frazon: "El tiu ĉi podio mi volas amike saluti la prezidanton de UEA, Humphrey Tonkin, kiu iniciatis renkontiĝon kun reprezentantoj de la Plenum-Komitato de SAT en Parizo" (v. nian revuon, majo 1975, p.82).

La labora parto de la 48a Kongreso de SAT traktis i.a. raporton pri la pasintjara agado de SAT, enhavis plurajn prelegojn kaj diskutojn kaj dediĉis apartan atenton al la financa stato de la organizaĵo. Estas interese, ke la Kongreso diskutis kreon de duobla kotizsistemo, kiu dependus de la financa stato de ĉiu unuopa membro, sed oni prokrastis decidon pri tiu propono, kiu havis subtenon de la gvidantaro de SAT. Valoras tamen noti, ke la jaro 1974 estis sendeficita por SAT, ĉefe dank' al donacoj kaj bona vendiĝo de kelkaj eldonaĵoj (antaŭ ĉio *Plena Ilustrita Vortaro*).

La kongresanoj faris plurajn ekskursojn dum la kongresa semajno kaj ĝuis teatran spektaklon, kiun prezentis la Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, Jugoslavio.

En la Gvidrezolucio de la 48a Kongreso de SAT oni aparte notas lastatempajn iniciatojn favore al Esperanto en la sindikataj rondoj kaj ĉe la Socialista Internacio. La rezolucio pledas por ellaboro de agadplanoj, kiuj ebligis pli intensan kaj pli efikan laboron sur tiu kampo. Ankaŭ la SAT-Kongreso sendis mesaĝon al la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Helsinko, kion faris ankaŭ la Komitato de UEA el Kopenhago. Meze de ĉi tiu jaro SAT ankoraŭ estis en embarasa situacio (simile al UEA pasintjare) rilate la lokon de sia venontjara kongreso. La solvo de la problemo venis el Skandinavio (kiel ĉe UEA), ĉar la 49an Kongreson invitis la sveda urbo Gotenburgo. Ĝi okazos inter la 24a kaj 31a de julio 1976, do en la semajno antaŭ la 61a Universala Kongreso en Ateno.

Komisiito pri sporto

La Estraro de UEA serĉas respondecan kaj iniciateman personon, kiu povus funkcii kiel Komisiito de UEA pri Sporto. Inter liaj/ŝiaj diversaj taskoj estus: ellabori kaj plenumi kunordigitan laborprogramon sur tiu kampo, kunordigi de jaro al jaro la agadon lige kun la Olimpikoj (kaj plivastigi tiun agadon), iniciati pli detalajn esplorojn pri la lingva problemo inter sportistoj kaj pri ĝia solvo, rilati kun internaciaj sportaj organizoj, ktp. La posteno estas sensalajra, kun repago de efektivaj kostoj. Proponojn aŭ sinproponojn sendu al la prezidanto de UEA.

La najlo de la hoĝo Nasr' Eddin

(Orienta fabelo)

La fama muezin',
nu, lia hoĝa moŝto Nasr' Eddin
kune kun sia hoĝedzin'
viziton foje faris tradician —
ceremonian —
al bej' Hasano pia,
amiko tre fidela sia,
kaj al lia rondo familia.

La riĉa kaj potenca domomastro fandis sin
en afablecon antaŭ l' eminenta muezin',
ĉar iam Nasr' Eddin
al li tre gravan servon faris.

— Mi ĝuas nun, la bej' deklaris,
la tre feliĉan precedencon
al vi proponi mian rekompencan.
Elektu do: arĝenton, oron, aŭ tre raran gemon.

— Amiko mia kara,
la pia islama ne devas havi emon
al valorajo tera, materia,
kaj tie ĉi Korano estas klara
kaj kategorio. . .

Sed, se vi havas noblan volon
al mi donaci nepre ian ajn obolon
kiel simbolon
de nia nerompebla amikeco —
ĝi estu el alegoria speco:
Nur pri enbato de modesta najlo
en la internon de via serajlo
mi petas nun vian permeson.

La najlo restu tie ĉi kiel emblemo
de nia reciproka bonvolemo.

La bejo diris sian jeson
kun tono malkontenta kaj protesta
pro la postulo tre modesta.

Do, post la fikso de l' emblema feropeco
kaj interŝanĝ' de reciproka afableco,
la eminenta
hoĝo Nasr' Eddin
retiris sin
feliĉa kaj kontenta.

Post kelkaj tagoj, jen la erudita islamano
revenis en la domon de la bej' Hasano:

— Permesu, kara bej', ke mi kontrolu
de mia najlo la bonstaton. . .

— Nu, bonvolu!

— Mi kun bedaŭro faras la konstaton,
ke mia najlo estas ne tre belaspekta

kaj nur bezonas unu solan frapon
per la martel' sur sian ĉapon,
por reekstari en la pozicio rekta
kaj plu ne timi la ŝancelon. . .

Hasano disponigis la martelon,
kaj tuj la najl' ekstaris en la stato sendifekta.

Sed ek de tiu tago, hoĝo Nasr' Eddin
jam kun senlaca diligento kaj obstin'
komencis fari preskaŭ ĉiutagajn —
vere plagajn —
vizitojn,
ofte tute eĉ neatenditajn,
jen dum ofica tempo, jen dum Ramadano,
al la loĝej' de bej' Hasano
kun tenera varto
kaj kun zorgo senkompara
por la sekuro kaj bonfarto
de sia najlo tiom kara.

Hasan' toleris ĉion
kun pacienco bova
en nomo de la amikec' malnova,
montrante eĉ nenian ajn defion.

Sed iun nokton, jam en horo tre malfrua
la bej' vekigis pro frapad' alarma brua
sur sian pordon. . . Tuj malfermas ĝin —
kaj antaŭ li ekstaras hoĝo Nasr' Eddin:

— Ĉi-nokte sonĝon havis mi teruran —
misaŭguran —
pri mia bedaŭrinda najlo:

Iu kanajlo
per ia stranga pinĉtenajlo
ĝin elŝanceli provis
kaj ĝin apenaŭ ne elŝovis
el ĝia loko destinita.

En horror' ekscita
mi tuj martelon mian prenis
kaj jam alvenis
ripari mem la akcidenton.

La saman momenton
hoĝo Nasr' Eddin
komencis frapi sian najlon tiel forte,
ke la infanoj, la bejin'
kaj eĉ la bejo mem eksentis sin
terure malkomforte. . .

Finfine bej' Hasan' ne plu eltenis,
li tre defian pozon prenis
kaj turnis sin
al la impertinenta muezin':

— Nu, hoĝo, ĉi-okazon mi profitas
por memorigi vin pri olda aksiomo:
"Amika najlo en amika domo
amikan amon baldaŭ kompromitas."

La lingvo de amika, frata lando,
trudata per tre lerta kulturpropagando,
kiu sub la fascin' de amikec' prezentas ĝin
al iu tre kredema gent', popol' aŭ klan',
similas al la najlo de la hoĝo Nasr' Eddin
en la loĝejo de la bej' Hasan'.

Stojan Ĝuĝev

Por kapti ŝteliston

EKSTERE la domo aspektas sufiĉe impona. Ĝi staras sola, je taŭga distanco de la flankdomoj. La ŝirmitan enirejon oni atingas per larĝa vojeto, ambaŭflanke de kiu estas florbedoj. Tiuj estas tute ordigitaj, ilia bunta aspekto montranta ke iu floramema prizorgas ilin.

En la laŭmode meblita salono estis iom mallume. Nur lumeto el la malproksimaj stratlampoj enradiadis. Sed eĉ tiu lumeto subite malaperis, pro tio, ke iu kuntiris la pezajn kurtenojn. Preskaŭ samtempe aperis sur unu muro hele lumigita rondeto. Ĝi ekmoviĝis. Tre malrapide ĝi ĉirkaŭiris. Iufoje ĝi aŭ restis senmova sur iu meblo aŭ iris iom ree. Seĝo, tableto, televidaparato, envazaj floroj, libroŝranko, estis vice lumigitaj. Denove sur muro ĝi transpasis bildon, haltis, reiris ĝis la bildo. Tie ĝi denove haltis, kaj post momento ĝi komencis malpligrandiĝi.

La lumradioj kaŭzantaj la helrondon longkonuse kunigis ĉe elektra torĉo en la mano de granda viro. La malpligrandiĝo estis pro tio, ke li malrapidpaŝe proksimiĝis al la bildo.

Atinginte la bildon, li flankenmovis ĝin per sia libera mano. Jen! Malkaŝiĝis io metala — gardoŝranko! Li zorge malpendigis la bildon. Enigmo? Certe! Sed ĉu li ne estas spertulo pri tiaj aferoj? Li ja ne bezonas ŝlosilan kombinaĵon, nur sian spertegon.

Li almetis unu oreton tute kontraŭ la surfaco de la gardoŝranko kaj eklaboris. Pasis kvin minutoj - dek - dek kvin. Lia frunto ŝvite malsekiĝis. Diablo! Kia aferaco! Epitetoj mallaŭte aŭdiĝis — vortaĉoj, eĉ fivortoj. Sed la eta pordo restis firme fermita.

Subite li paŭzis. Ĉu li aŭdis elĉambran brueton?

Aŭskultante longŝajnan minuton, li restis senmova.

Nenion plu. Li rekuraĝiĝis kaj daŭrigis sian laboron.

En lia alpremita orelo nenio ĝis nun aŭdiĝis. Subite — aŭdebla nur en tiu orelo — klaketo. Liaj okuloj ekbrilis; li tute vigliĝis. Klaket'! Alia! Kaj sekve kelkaj pli. Li tiris je la tenilo. Sukceson! La pordeto moviĝis — tute malfermiĝis.

Li levis la elektran torĉon kaj enrigardis. Ian ledkovritan juvelujon li vidis, ankaŭ nigran skatolon. Li ekenmetis sian manon. Subite lia tuta korpo rigidigis, ĉar la tuta ĉambro fariĝis hele lumigita. Post momento li malrapide turnis sian kapon.

Starante ĉe la malfermita pordo, pistolo en unu mano, la alia ankoraŭ sur ŝaltilo, viro rikane rigardis lin.

Tualetrobe vestita, la viro longe diris nenion. Nia domŝtelisto ne kapablis ion diri! Li malvigliĝis ĝis tute rezigna aspekto.

La nova alveninto alproksimiĝis kaj ordonis ke la dom-

ŝtelisto staru kun vizaĝo kontraŭmure. Tiam li movis serĉantan manon surkorpe. Nenia pafilo troviĝis.

"Iru tien, en la angulon."

Silente la grandulo obeis. Tuj la alia iris al verda telefono, kiu staris sur tableto. Per sia senpistola mano li deprenis la ilon, metis ĝin sur la tableton, kaj malrapide diskis numeron. Repreninte la ilon, li atendis.

Post momento li parolis. "Mi volas raporti, ke mi ĵus kaptis domŝteliston. Mi surprizis lin ĉe la malfermita gardoŝranko. . . . Mia nomo estas Alekso Adler. . . . mia adreso, 12 Verda Avenuo. Ĉu vi rapidos? Bone!"

Nun li direktis sian tutan atenton al la granda domŝtelisto. Tiu malfeliĉulo almenaŭ rekapablis paroli.

"Oni diris al mi ke vi ferias," li plende diris.

"Nu, oni ege malpravis, ĉu ne?"

"Tutcerte la aĉuloj malpravis. Ili atendu ĝis mi revidos ilin!"

"Ili devos atendi longe, aŭ viziti vin en la malliberejo!"

"Diablo!"

Estis sono de aŭta motoro el ekstere kaj post momento sonorilo endome aŭdiĝis. "Jen la policianoj! Ili certe rapidis!" La viro malantaŭeniris ĝis la salona pordo kaj laŭte kriis, "La pordo ne estas ŝlosita. Envenu."

Du policianoj envenis, kaj la viro enpoŝigis la pistolon.

"Bonan vesperon, sinjoro," diris unu el la policianoj.

"Ni informiĝis per la radio. Gratulojn! Vi faris bone.

Tiu kulpulo," li kapmove indikis la domŝteliston,

"estas bone konata ĉe ni, kaj ni longe volis kapti lin."

Al sia kunulo li ordonis: "Mankatenu lin."

Tion farinte, li denove turnis sin al nia heroo. "Dankon, sinjoro. La poliestro komunikos kun vi pri atesto."

"Kompreneble! Mi estos preta fari ĉion necesan."

La policano elpoŝigis notlibron kaj skribis dum du-tri minutoj. Li notis kelkajn detalojn — daton, horon, adreson, k.t.p. Tiam li laŭtleĝis kaj poste diris: "Ĉu vi konsentas ke ĉio jam notita estas ĝusta?"

"Jes, mi konsentas."

"Nu, ĉu vi permesos ke mi faru peton?"

"Certe."

"Bonvole certigu ke nenio mankas en la gardoŝranko."

"Mi opinias ke li ne havis tempon por elpreni ion.

Tamen, mi kontrolos." Post du-tri minutoj li anoncis, ke ĉio estas en ordo.

"Bone! Dankon, sinjoro," diris la policano. "Ni forkondukos la malliberulon." Li ekiris porden, hezitis momente, kaj, turniĝante, diris: "Estas unu plia demando, kiun mi devus fari."

"Kio estas?"

"Kiam ni eniris la ĉambron vi enpoŝigis pistolon. Mi pardonpetas pro la demando, sed vi komprenos ke estas mia devo tiel fari. Ĉu vi havas oficialan permesilon?"

La viro ne tuj respondis. La domŝtelisto iom interesiĝis, kaj sendube esperis aŭdi nean respondon. Certe plaĉos al li se la kaptinto mem suferos almenaŭ iometan ĝenon el la afero.

La viro elprenis cigaredon kaj malrapide interlipigis ĝin. Tiam li elpoŝigis la pistolon, levis ĝin kaj premis la el-lasilon. Flamo ekestis ĉe ĝia supro, per kiu li ekbruligis la cigaredon.

La granda domŝtelisto eksaltis kaj kriis, "Vi . . . , vi . . . "

La alia policano interrompis lian ekparoladon per puŝo. "Silentu kaj ekiru! "

Je tio, la du policanoj eliris, kondukante la katenitan grandulon. La viro sekvis ilin ĝis la doma pordejo kaj rigardis dum ili enaŭtiĝis. Li rigardadis ĝis la malapero de la polica aŭto.

Reenirinte la domon, li supreniris al litĉambro. Tie li demetis la tualetan robon, zorge pendigis ĝin en vestoŝranko, prenis jakon de sur seĝo kaj surmetis ĝin. Li malsupreniris, eniris la kuirejon, alprenis surplankan valizon kaj reeniris la salonon.

Apud la gardoŝranko li metis la valizon sur la plankon kaj malfermis ĝin. El la gardoŝranko li prenis la du ujojn kaj metis ilin en la valizon. Li ankaŭ elprenis fasketon da bankbiletoj. Tiujn li enpoŝigis. Tiam li fermis la pordeton kaj zorge rependigis la bildon.

Ĉirkaŭrigardinte, li elpoŝigis malgrandan elektran torĉon, malŝaltis la lumon, disigis la kurtenojn, kaj fine eliris, kunportante la valizon.

En apuda strato li eniris aŭton, ekfunkciigis la motoron kaj ekveturis, celante nur la plej laŭeblan distancon inter li kaj la urbo.

* * *

Samtempe — en Jugoslavio — gesinjoroj Adler kontente trinketis vinon kaj aŭskultis orkestron en sia hotelo.

Ray Smith

Kiel oni aktivigas en Tallinn

ESPERANTO-KLUBO de Tallinn, la ĉefurbo de Soveta Estonio, laboras ĉe la Domo de Klerig- kaj Scienc-Laboruloj. Kunvenoj okazas ĉiumerkrede de la 18.00 - 21.00, kiujn kutime partoprenas 34 - 45 klubanoj. Je la 19-a horo aperas ĉiusemajna "Viva Gazeto", havanta diversan enhavon. Ĝi daŭras proksimume 90 minutojn. La ĉefaj temoj de la gazeto estas antaŭplanitaj por ĉiu kvaronjaro. La kunvenoj okazas dum la tuta jaro, kun escepto de someraj ferioj. Ŝatataj estas la kunvenoj dediĉitaj al unuopaj landoj, ilustritaj per lumbildoj. Okazis, ekzemple, tiaj vesperoj dediĉitaj al Soveta Litovio, Japanio, Italio, Usono, Francio, antaŭvidataj estas pollanda kaj finlanda vesperoj. Okazis ankaŭ vesperoj, dediĉitaj al tutmondaj famuloj, kiel Nikola Kopernik, Enriko Karuso, sed ankaŭ al estonaj verkistoj kaj poetoj, naturprotekto, memedukado, novaĵoj de la pasinta monato, ktp. En la programo neniam mankas informoj pri E-movado enlanda kaj eksterlanda, same fragmentoj el la historio de la Internacia Lingvo. La klubo havas

proksimume 1000 ekzempleran esperantlingvan bibliotekon.

La lastan jarkunvenon partoprenis proksimume 60 personoj. Ĝi daŭris du horojn, ĉar estis preparolitaj tre multaj, sufiĉe gravaj demandoj. La jaro pasinta ja pasis pli-malpli ordinare, sed la lasta estrara kunveno decidis multe ŝanĝi la laborstilon de la klubo, kio eble iom plivigligos la klubvivon.

La estraro decidis krei diversajn komisionojn, tiel ke ĉiu klubano povu preni sur sin taskojn laŭ sia intereso. Pli frue la klubo havis jam lingvistikan, junularan kaj naturprotektan komisionojn, nun oni decidis aldone krei la turisman, pedagogian, literaturan, tradukistan, kolektantan, korespondan, informan, pacdefendan, ekonomian, teatran, muzikan kaj virinan komisionojn. En kelkaj mezlernejoj de Tallinn Esperanto estas instruata nedevige. Krome okazas kursoj ĉe la Domo de Klerig- kaj Scienc-Laboruloj kaj ĉe kelkaj kulturdomoj de la urbo. De tempo al tempo la estonaj kaj ruslingvaj ĵurnaloj mencias Esperanton.

Benita Kärt

Sennacieca Revuo 1975

ANKAŬ la 24a postmilita kajero de *Sennacieca Revuo* distingiĝas per tre bona nivelo, kiu igas tiun ĉi ĉiujaran periodaĵon rangi inter la pli legindaj Esperanto-revuoj. Enkondukas ĝin ampleksa artikolo de Cor Bruins pri "Sennacieca kulturo" — interesa, kvankam teme eble iom tro ŝargita. S. Aarse konigas la vivon kaj verkon de Multatuli, la nederlanda verkisto, kiu en la pasinta jarcento senmaskigis, kiel la nederlandanoj ekspluatis la javanojn (de la nuna Indonezio). En "Helplingvo de la heĝoj", Marjorie Boulton prezentas la fantazian romanon de Richard Adams, *Intima vivo de la kuniklo*, kun specimenoj pri la tie traktata "lapina" lingvo de la — hom-similaj — kunikloj kaj pri ilia "Esperanto", la "heĝa piĝino". Prave ŝi pledas por Esperanta traduko de tiu romano. (ul)

Monda Karuselo

EKDE JANUARO 1975 aperas nova kvaronjara revuo, belaspekta, kvankam tajpita kaj ofsetpresita. *Monda Karuselo* — tiel ĝia nomo — evitas artikolojn pri Esperanto, sed aperigas artikolojn de ĝenerala intereso: rakontojn, diskut-kontribuaĵojn, enigmojn, humuraĵojn. Tiaspeca revuo efektive mankas de post la morto de *La Praktiko*, kaj se *Monda Karuselo* ankoraŭ pli adaptos sian lingvaĵon al komencantoj, ĝi povus verŝajne rapide plenigi breĉon en la Esperanto-gazetara merkato. La redaktoro estas Aleksandro R. Mollison, Skotlando. Abonojn (6,- gld. por 4 numeroj) — adresas: F-ino Margaret Duncan, 24 Constitution Street, Glasgow, Skotlando. (ul)

Streĉoj kaj turnoj

Recenzas Lajos Tárkony (Hungario):

Mia verda breviero, de Jean Forge. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1974. 264p. 18cm. Broŝ.

La libro estas la kvina el la "Serio Forge" eldonata de Fondumo Esperanto. La aŭtoro, kiu inter la du mondmilitoj prezentis sin per unu psikologia kaj du pli-malpli sciencfikciaj romanoj, en siaj du lastaj verkoj turnas sin precipe al Esperantujo, kiel montras ankaŭ la epiteto "verda" en la titoloj. Lerte kaj verve li povas viviĝi antaŭ ni diversajn esperantistajn tipojn: la maljunan pioniron, kiun senreviĝoj ŝajnas rompi, sed kiun sukceseto reanimas; diversaspecajn sed egale naivajn figurojn ĉirkaŭ la rajdĉevalo Esperanto; la optimiston, la fervoran oldulinon, la skeptikulon, la ĉarmulinon, la kontentulon, la fanatikulon ktp. Lerte li povas enplekti Esperanton en am-aferon garnitan per kriminala saŭco; simpatie li rakontas siajn unuajn paŝojn en Esperantujo. Estas bedaŭre, ke la plej ekscita krimrakonto, kies disvolviĝon ni sekvas kun streĉa scivolo, finiĝas kiel blufo. La lasta peco, kiu estis ankaŭ filmigita, montras per sombraj koloroj scenaron el la submondo de grandurbo. La aŭtoro havas tre vivan rakontmanieron, per kiu li povas kateni la atenton de la leganto, preskaŭ oni povus diri, ke li estas majstro de streĉoj kaj turnoj. Eble en la sola "Patro kaj filo" oni ne sentas tiun trenon de la rakonto, sed ĉi tiu peco, laŭ la aŭtoro mem, estis verkita antaŭ pli ol kvindek jaroj; ĝi bone servas kiel kontrasto montranta lian evoluon. Kompreneble mi ne asertas, ke la verko apartenas al la "granda" literaturo, sed en sia speco ĝi estas valora kaj interesa, plezure legebla de ĉiu pli-malpli konanta la esperantistan mondon.

La lingvaĵon mi trovis neriproĉebla; "nigre-hara" anstataŭ la ĝusta "nigra-hara" supozeble estas preseraro.

Prezo: 13,50 (por Nederlando 14,04) gld. plus sendokostoj 10%.

Dankinda verko

Recenzas N.Z. Maimon (Usono):

Enciklopedia vortaro Esperanta-jida, de H. Rusak. Jeruzalemo: Eldonejo Zamenhofa Domo, 1969 (vol. 1) kaj 1973 (volumo 2). 670p. 24cm. Bind.

La jida lingvo havas unu trajton komunan kun Esperanto: neniun registara forto staras malantaŭ ĝi. Tial — same kiel Esperanto — ĝi apogas sin sur la amo kaj libervolo de siaj parolantoj. Tamen, la parolantoj de la jida, iam milionoj, estis reduktitaj al minimumo. La

satano, kiu ekstermis grandan parton de la juda popolo, ekstermis ankaŭ ilian lingvon. Malgraŭ tio ĝi ankoraŭ vivas, precipe en Usono. La atingiĝoj de la jida sur literatura kampo estas rimarkindaj kaj kelkaj el ĝiaj verkistoj akiris famon ankaŭ ekster la juda medio (Ŝalom-Alejĥem, Ŝalom Aŝ kaj nun Isaak Baŝevis Singer).

Israelo elektis la hebrean lingvon. La jida ne povis tie enradikiĝi. Sed lastatempe — pro la alveno de novaj enmigrintoj el Rusujo — fariĝis tiu lando la plej grava kaj plej vigla centro de kultura agado ankaŭ en la jida. Jidaj libroj estas tie daŭre presataj kaj eldonataj. La lasta, kiu ĵus venis en niajn manojn, estas la grandformata, duvoluma *Enciklopedia vortaro Esperanta-jida*, verkita de H. Rusak.

Tio estas grandioza verko. Aperis tamen en 1966 simila grandformata vortaro, de Harry Fineman (*Plena Esperanto juda vortaro* kaj *Plena juda Esperanto vortaro*), sed eĉ supraĵa trarigardo malkaŝos la diferencon: tiu de Rusak estas pli plena kaj pli ellaborita: ĝi multe superas la antaŭan laŭ enhavo kaj amplekso. Ĉar Rusak estas fakulo, kutimiĝinta al sciencaj labormetodoj, kaj li bonege regas la jidan lingvon. Lia lingvaĵo estas polurita, lia ortografio moderna, liaj difinoj precizaj. Li prezentas **la tutan** vorttrezoron de Esperanto, kun **ĉiuj** derivaĵoj, kaj **la tutan** trezoron de la jida, en **ĉiuj** ĝiaj nuancoj. Tiamaniere ambaŭ lingvoj aperas en sia plena riĉeco. Por Fineman sufiĉis 149 paĝoj (en la Esperanta-jida parto), Rusak bezonis 640.

Amplekse laŭ enhavo, enciklopedie laŭ karaktero, kun klarigaj notoj aldonitaj al sociaj, sciencaj, medicinaj kaj teknikaj terminoj — jen la ĉefaj ecoj de la nova jida vortaro. Sen ia troigo ni rajtas diri, ke kun tiuj ecoj ĝi enviciĝas inter la plej bonaj Esperantaj gvidiloj, kiujn ni posedas. Jidlingvanoj akceptos ĝin kun danko en sia koro.

"Al tiu ĉi giganta verko dediĉis la aŭtoro multajn jarojn de persista kaj sistema laboro", tiel rakontas J. Kohen-Cedek en sia Enkonduko. Ni povas aldoni, ke la rezulto nin plene kontentigas. Sed, ĉar ĝi estas verko de unuopulo, malglataĵoj estis neeviteblaj. Jen kelkaj, kiujn mi hazarde renkontis:

1) troviĝas *cinismo*, sed mankas *cionismo*; troviĝas *pastoro*, sed mankas *pastro*; ĉe *edziĝi* mankas *edziniĝi*;

2) *ario* aperas samforme por du diversaj nocioj, dum ni diferencigas: *ario* — en la opero, *arjo* — ano de certa raso;

3) *Malnova Testamento* estas tradukita kiel *alter testament* — ŝajnas al ni, ke en jida vortaro oni atendas aldonan noton: "kristana nomo de *Tanaĥ*" (hebrea Biblio). Ĉe *Nova Testamento* enŝteliĝis traduko de *testamenti*, kaj *testamenti* mem malaperis — simpla preseraro. Tiel same *evalui* anstataŭ *evolui*;

4) inter la 14 ekvivalentoj por *Dio* mankas tia populara kiel: *Rebojne ŝelojlem* (Mastro de l' Mondo).

Tamen, la malglataĵoj estas relative malmultaj kaj nenion deprenas de la valoro de tiu vortaro.

Prezo: Anoncota.

Brazila klasikaĵo

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Iracema, de José de Alencar. El la portugala trad. Benedicto Silva. Rio-de-Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1974. 149p. 20cm. Broŝ.

José de Alencar (1829-1877) per siaj romantismaj, "indianismaj" romanoj kaj noveloj estis unu el la kreantoj de la brazila literaturo, kontraste al la portugala. En "Iracema" (1865) li proprigas al si vortojn kaj stilfigurojn el la indiana uzo. Riĉigante la stilon, tio ne ĉiam plifaciligas la legadon, sed glosaro estas provizita. En "Iracema", Alencar glorigas la kuniĝon de eŭropanoj kaj indianoj, samtempe montrante senfine pli da estimo por la indianoj ol faris iuj brazilaj registaroj.

Vojerarinte, la blanka, "kristana" militisto Martim trovas gastaman akcepton ĉe la Ŝamano de la *Tabaĵaroj*. Ties filino, Iracema, rita virgulino de sia religio, eĉ pli gastame traktas lin, tiel ke ŝi devas fuĝi kun li al la apudmaraj teritorioj de la *Pitigvaroj*: malamikoj de ŝia popolo, sed amikoj de Martim kaj de la portugaloj. Kun ili Martim batalas kontraŭ la (francaj) barbaroj, kiuj ankaŭ provas koloniigi parton de la kontinento. Li revenas, sed la feliĉa familia vivo jam ne plu longe daŭros.

La iom pompeca stilo propra al la romantismo kondukas al forta poezia prozo, almenaŭ en la traduko, kies sonora lingvaĵo invitas al laŭtleĝado. La originalon mi ne povas koni, sed laŭ tiu ĉi eldono, Alencar ne senkaŭze estas klasikulo de la brazila literaturo.

Kelkajn vortojn neglositajn mi renkontis unuafoje en tiu ĉi traduko. La glosaro tamen supozigas, ke ili ja troviĝas en PIV.

Prezo: 7,50 (por Nederlando 7,80) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Antaŭen al la laboro! (1974); Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 3. Kioto: Eldonejo Ludovikito. 344p. 22cm. Bind. 20,— gld. Tiu ĉi kajero, laŭ sia subtitolo "Tempo de *Esperantisto*", koncernas la jarojn 1892 — 1895. Kiel kutime, enestas postparolo, komentoj kaj indeksoj.

Biografioj de pli elstaraj jugoslaviaj fervojistoj esperantistoj (1975), M. Gjivoje. Niŝ: Fervojista Esperanto-Societo. 40p. Ilus. 20cm. Broŝ. 4,20 gld.

Brilanta ruĝa stelo (1974). Pekino: Fremdlingva Eldonejo. 120p. (ne numerita). 13cm. 1,— gld. Bildrakonto el la Ĉina Revolucio.

Doktor Esperanto (1959), M. Ziolkowska. El Esperanto en la hispanan tradukis J. Najera Castaneira (1975). Mexico: Junularo Meksika Esperantista. 221p. 20cm. Broŝ. 7,20 gld.

Estrara Raporto 1974/1975. Rotterdam: UEA. 47p. 15cm. Raporto pri la agado de Universala Esperanto-Asocio dum la laborperiodo 1974/75. Senpage ricevebla ĉe la Centra Oficejo.

Foraj Steloj, La (1974). Hanojo: Fremdlingva Eldonejo. 254p. 19cm. Broŝ. 4,40 gld. Traduko de 12 noveloj de 9 nuntempaj vjetnamaj aŭtoroj.

¿Habla usted en Esperanto? Ĉu vi parolas en Esperanto? (1972), Ergoto de Bonaero. Dua eldono, 1975. Buenos Aires: Instituto Argentino de Esperanto. Unua volumo: 96p.; dua volumo: 80p. Ilus. 17cm. Broŝ. Prezo de ambaŭ volumoj kune 9,30 gld. Reviziita eldono de la baza lernolibro antaŭe aperinta en unu 20-leciona volumo. En aparta kajero aperis **Clave y ejercicios adicionales**, 36p. 22cm. 2,70 gld.

Hamburgo en retrospektivo (1975), I. Lapenna (1909 -). Saarbrücken: Sarlanda Esperanto-Ligo. 96p. 29cm. Broŝ. 10,98 gld.

Institut für Kybernetische Pädagogik (1975). Paderborn (FRG): Instituto pri Kibernetika Pedagogio. 70p. Ilus. 21cm. Broŝ. 3,06 gld. Dulingva (germana kaj Esperanta) raporto pri la instituta laboro ekde 1971 kaj pri estontaj projektoj. Enestas ankaŭ angla, franca kaj itala resumo kaj bibliografio de la institutaj kunlaborantoj.

Jarlibro de SAT 1975-1976. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda. 160p. 14cm. Broŝ.

Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko (1931), E. Wüster. El la germana trad. E. Pfeffer (1975). Aabyhøj: Dansk Esperanto Forlag. 130p. 20cm. Broŝ. 10,08 gld. ISBN 87 85020 842. Koncizigita, sed parte kompletigita traduko de la influa germanlingva originalo aperinta en 1934.

Latva fabelareto (1975). El la latva trad. B. Najbaro. Eldono de la tradukinto. 20p. ilus. 21cm. Broŝ. 2,40 gld. Kvar latvaj popolaj

Laŭtema vortaro Esperanta-kroatserba (1975), F. Španjol. Borovo: Voĉo. 88p. 17cm. Broŝ. 6,60 gld. Proksimume 5000 Esperantaj vortoj kun paralela traduko en la kroatserban, klasifitaj laŭ ĉ. 50 temoj kaj alfabeto ordigitaj en ĉiu sekcio.

Lusin, granda revoluciulo, pensulo kaj literaturisto (1975). Pekino: Fremdlingva Eldonejo. 26cm. 3,— gld. Albumo kun 15 reproduktitaj koloraj pentraĵoj pri Lusin.

Nederlando koncize (1975). Hago: Ministerio de Eksterlandaj Aferoj. 48p. Kolorilustrita. 22cm. Broŝ. Riĉe ilustrita informilo pri Nederlando.

Neologisme (1975), Lorjak. Helsinki: Fondumo Esperanto. 88p. 18cm. Broŝ. 10,02 gld. Originala romaneto, verkita lerte en sprita lingvaĵo.

Poŝtkartoj "Kantono kaj Junnan" (1974). Pekino: Fremdlingva Eldonejo. Serio de 6 koloraj bildkartoj. Unu serio 0,60 gld.

Poŝtkartoj "Metiartaĵoj de Ĉinio" (1974). Pekino: Fremdlingva Eldonejo. Serio de 12 koloraj bildkartoj, kun i.a. Esperantaj klarigoj dorsflanke. Unu serio 1,20 gld.

Saĝa kapto de granda huzo (1974), red. Du Vej. Pekino: Fremdlingva Eldonejo. 36p. Kolorilus. 20cm. Broŝ. 1,20 gld. Bildrakonto por infanoj.


Segmentumitaj animalaj grupoj (1974), C. Støp-Bowitz. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj. 86p. Ilus. 29cm. Broŝ. 19,20 gld.

Sufiksitaj Vortoj el Zamenhof; Plena Vortaro Rusa-Internacia, 2a eldono, 1896 (1975), N. Kawasaki. Osaka: la aŭtoro. 9p. 37cm. Fotokopiita. 2,— gld.

Supplement till Svensk-Esperantisk Ordbok (1975), E. Vilborg. Malmö: Eldona Societo Esperanto. 210p. 21cm. Broŝ. 10,50 gld. ISBN 91 85288-01-2.

Tamen la afero progresas! (1975); Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 4. Kioto: Eldonejo Ludovikito. 414p. 22cm. Bind. 21,— gld. Koncernas la jarojn 1896 — 1900 kaj portas la subtitolon "Komenca tempo de *Lingvo Internacia*". Enhavas ankaŭ postparolon, notojn kaj indeksojn.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 16% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— guldenoj**.



Coimbra: TEJO premieris tie kun internacia Esperanto-aranĝo en Portugalio.

LINGVO KAJ POLITIKA SUBPREMADO:

TEJO en Coimbra

ĈU LINGVO POVAS ESTI ilo por politika subpremado? Kian rolon ludas eŭropaj kulturoj ĝenerale en la politika evoluo de la ekskoloniaj landoj? Tiuj demandoj kaj multaj aliaj similaj estis pritrakitaj dum seminario okazinta en Coimbra, Portugalio, de la 5a ĝis la 11a de oktobro 1975. La Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO organizis la seminarion sub aŭspicio de la Beletra Fakultato de la Universitato en Coimbra kaj per subvencioj de la Eŭropa Junulara Fondaĵo. Ĉeestis proksimume 25 partoprenantoj el 11 diversaj landoj en kaj ekster Eŭropo, kaj ili disponis pri tuta nova kunvenejo ĉe la Universitato, kun moderna tradukaparataro kaj samtempa interpretado inter la franca, angla, portugala kaj Esperanto. Krom la teksto "Portugalaj lingvo kaj kulturo en Afriko", origine verkita de grupo da verdkabanoj, ankaŭ prezentitaj kaj vigle diskutitaj estis la jenaj referaĵoj: "La lingva lukto en Bretonio" de prof. Per Denez (Francio), "Mito pri la franca civilizacio en Alĝerio" de Roman Dobrzyński (Pollando), kaj "La politika uzo de lingvo" de Mauro la Torre (Italio). Ankaŭ pliaj artikoloj jam eldonitaj de KER sekve de antaŭaj seminarioj estis utiligitaj kiel labormaterialo.

La partoprenantoj havis okazon aŭskulti reprezentantojn de diversaj politikaj partioj en Portugalio, kiuj diskutis pri la aktuala politika situacio en tiu lando, kaj aŭdi iliajn opiniojn rilate la lingvan problemaron. Cetere, oni aŭdigis deklarojn, senditajn al la seminario de lingvaj minoritataj organizoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la televido, radio kaj gazetaro. ĝk

TEJO-paĝo

NEDERLANDA ESPERANTO-JUNULARO:

Ĉu inspiro?

JUNULARAJ ARANĜOJ floras pli kaj pli en malsamaj landoj. Pri nova dana aranĝo vi povas legi aliloke sur ĉi tiu paĝo, dum ĉi tiun lokon ni dediĉas al renkontiĝo okazinta en Nederlando, en la semajnfino de la 17a ĝis la 19a de oktobro en Sint Michielsgestel. Tien alvenis 40 junaj partoprenantoj el diversaj landoj: krom el la najbaraj, ankaŭ el Danlando kaj Francio. Planita estis grupa diskuto pri junulara Esperanto-agado. Tamen, pro manko de antaŭpreparoj kaj diskutcelo ĝi fariĝis malhomogena interŝanĝado de spertoj kaj opinioj. Pli sukcesis laborgrupo por komencantoj, gvidita de Paŭlo Ereno, brazilano loĝanta en Nederlando. Prelego kaj lumbildoj pri Kolombio (prelegis J. Hoekstra) merite vekis aplaŭdon de la partoprenintoj. Jam tradicia en nederlandaj junularaj aranĝoj estas instruado kaj praktikado de popoldancoj, kio ĉiam entuziasmigas kaj kreas kunigan atmosferon. Krome, tio bele agordiĝas kun la celo de Esperanto-parolantoj protekti kaj evoluigi la naciajn kulturojn. La renkontiĝon en Sint Michielsgestel dum mallonga tempo vizitis ankaŭ la prezidanto de UEA, kiu tiutempe traveturis Nederlandon.

La celo de ĉi tiu raporteto pri la nederlanda aranĝo kompreneble ne nur estas listigi faktojn. Eble la raporteto povas servi kiel inspiro por aliaj landoj; eble ĝi povas logi iun al partopreno en aranĝo; eble vi ekscivolas kiaspecaj semajnfinaĵaj renkontiĝoj estas aranĝataj ankaŭ en aliaj landoj. . . lk

JUNULARA SEMAJNFINO EN DANLANDO:

Venu denove!

INTER la 14a kaj 16a de novembro 1975, Dana Esperanto-Junularo aranĝos renkontiĝon en Videbæk, kiu situas okcidente de Herning, 60 km nordokcidente de la IJK-urbo Fredericia. En la programo: laborgrupoj, diskutado, aktorado. Krome, en la vesperoj estos tempo por amuzaj eroj: kantado, popoldancado, prezentadoj. Via kotizo inkluzivas ankaŭ dormadon kaj manĝojn. Por ĉio oni pagas 40 danajn kronojn, kio estas ege malmulte. La aranĝo komenciĝos vendrede per vespermanĝo, kaj finiĝos dimanĉe posttagmeze. Ekzistas speciala alvetureblo de Hamburgo. Se vi ŝatus kombini la partoprenon kun kelktaga gastado ĉe danaj gejunuloj, antaŭ aŭ post la aranĝo, bonvole menci tion en via letero kun aliĝo. Informiĝu kaj aliĝu ĉe: Christian Lauridsen, Østergade 43, DK-7430 Ikast, Danlando; telefono: (07) 15 21 05.



Kongresa Komunikilo

61a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Ateno 1976 07 31 — 08 07

Alta Protektanto: Georgios Ralis, ministro de la prezidanteco de la registaro de Greklando.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Poŝtkesto 3766, Poŝtoŭicejo Levidu, Ateno, Greklando.

Alta protekto

La Kongreso okazos sub la protekto de s-ro Georgios Ralis, ministro de la prezidanteco de la registaro, kaj kun forta subteno de ŝtataj kaj urbaj instancoj. Honora Komitato estas formata.

Kongresa prezidantaro

La Kongresa Prezidantaro konsistas el la prezidanto de UEA d-ro H.R. Tonkin, la vicprezidantoj d-ro W. Bormann kaj prof. d-ro C. Støp-Bowitz, la ĝenerala sekretario de UEA s-ro E.L.M. Wensing, la rektoro de la Internacia Somera Universitato, la prezidanto de Helena Esperanto-Asocio s-ino R. Manus kaj la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato s-ro G. Miggas.

Ampleksa LKK

La Loka Kongresa Komitato por Ateno, kies konsiston jam aprobe konfirmis la Estraro de UEA, havas 17 membrojn lokajn (plus 2 konstantaj el la Centra Oficejo). Tio estas jam 10 pli, ol la kopenhaga! La ĉefajn funkciojn okupas s-ro G. Miggas (prezidanto), s-ro S. Kusurakis kaj s-ro E. Mathiudakis (vicprezidantoj), s-ino M. Pontika (ĝenerala sekretario) kaj s-ro S. Tsitirides (dua sekretario).

Duflanka akcepto

Jam du instancoj — la ministerio de civilizo kaj la urbo Ateno — esprimis la deziron akcepte regali reprezentantojn de la Kongreso.

Oficiala flugkompanio

La greka nacia flugkompanio Olimpika (greke: Olimpiki; angle: Olympic) fariĝis la oficiala kompanio de la 61a UK. Ĝiaj agentoj diverslandaj jam kontaktis kun landaj Esperanto-instancoj por helpi pri organizo de flugkaravanoj al Ateno. Laŭ aparta kontrakto, Olimpika reklamas en la kongresaj eldonaĵoj kaj en la revuo *Esperanto* kaj interŝanĝe ebligas al la organizantoj flugojn inter Roterdamo kaj Ateno.

Moderne ekipitaj salonoj

La kongresejo de la 61a UK estas la altlernejo Pantios. Ĝi situas je 1500 metroj de la urbocentra placo Sintagma en la direkto de la maro. La kongresejo disponas pri kvar belaj salonoj klimatizitaj, por la ĉefaj kunsidoj, kun ĉiuj necesaj instalaĵoj kutimaj en kongressalonoj, kaj pri nombro da malpli grandaj salonoj por aliaj kunvenoj. Troviĝas ankaŭ manĝejo, gazetara ĉambro, oficejoj k.s.

Jam estas tempo por verki

Kiu havas ambicion gajni premion aŭ eĉ premiojn en la Belartaj Konkursoj, tiu farus bone, se li jam nun ekverkus. La limdato por la konkursaĵoj estas la 31a de marto 1976. Rajtas konkursi ĉiu aliĝinto al la 61a UK kaj ankaŭ ĉiu individua membro de UEA. Detale informas la sekretario de la Belartaj Konkursoj, s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey SM5 3 SE, Britujo. La plena regularo de la Konkursoj, kies rezultoj, kiel kutime, estos anoncitaj en la kadro de la Kongreso, troviĝas en la broŝuro *Statuto kaj Regularoj de UEA*, senpage havebla de la Centra Oficejo.

Kolorfilmo pri Ateno mendebla

Jam dum la 60a UK en Kopenhago estis montrita esperantlingva turisma filmo pri Greklando, preparita de la Greka Nacia Turisma Oficejo kunlabore kun LKK. Tie ĝi vekis grandan interesiĝon, kaj pluraj lokaj societoj kaj landaj kongresoj esprimis la deziron montri ĝin ĉe si. Temas pri filmo proksimume 20-minuta, 16mm. Ĉiu landa asocio, loka societo, landa, regiona aŭ alia kongreso, kiu deziras montri la filmon, bonvolu turni sin al la konstanta adreso en Roterdamo, indikante la precizan adreson, al kiu la filmo estu sendita, kaj la datojn, je kiuj ĝi estos bezonata. Ĉar estas disponebla nur unu ekzemplero de la filmo, ĝi devos cirkuli de unu loko al alia laŭ strikta plano, starigota surbaze de la ricevitaj petoj.

Aperos kvar belaj afiŝoj

La Greka Nacia Turisma Oficejo decidis eldoni ne unu, sed kvar belajn foto-afiŝojn pri Greklando kun surskribo en Esperanto. La afiŝoj aperos en po 1 500 ekzempleroj. Pri la maniero de distribuo kaj havebleco aperos detaloj en posta komunikilo.

TEJO-kongreso en Tesaloniko

Baldaŭ aperos la unua bulteno de la 32a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Tesaloniko (Greklando), bela marborda urbo 500km norde de Ateno, sur la ĉefa fervoja linio al la ĉefurbo. La tuta Kongreso okazos en unuaranga, vasta studenta domo, kun komfortaj unulitaj ĉambroj, klimatizitaj salonoj kaj manĝejo, ĉio sub la sama tegmento. Aliĝiloj estos riceveblaj

ĉe la konstanta adreso de la 61a UK kaj ĉe LKK en Ateno. Datoj de la 32a IJK: de la 24a ĝis la 31a de julio 1976.

Postkongreso sur bluaj ondoj

La Loka Kongresa Komitato en Ateno antaŭvidas organizon de plurtaga postkongresa ekskurso tra la greka insularo. Detaloj sekvos.

Kotizoj ĝis la fino de decembro 1975

Ĝis la 31a de decembro 1975 validas jenaj aliĝkotizoj (en guldenoj) por la 61a Universala Kongreso en Ateno:

1. Kongresano ne membro individua de UEA 135,00
2. Kongresano individua membro kun Jarl. 110,00
3. Kongresano ind. membro kun Jarlibro kaj la revuo *Esperanto* 85,00
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 94,50
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 77,00
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara 40,50
7. Universitata studento ĝis inkl. 30-jara 67,50
8. Blindulo 54,00

Aliĝiloj estas senpage riceveblaj ĉe la adresoj de la Kongreso kaj ĉe la landaj kotizperantoj.

Unua Bulteno en 30 000 ekzempleroj

Dank' al malavara subteno de la Greka Nacia Turisma Oficejo, la tradicia Unua Bulteno de la Universala Kongreso transformiĝis ĉi-jare en allogan, 8-paĝan kolore ilustritan broŝuron, eldonitan en 30 000 ekzempleroj, el kiuj ĉ. 20 000 estas jam distribuitaj aerpoŝte tra la mondo. Pliaj ekzempleroj estas mendeblaj ĉe la konstanta adreso, ĉe LKK kaj ĉe landaj perantoj.

Valoras reklami per la kongresaj eldonaĵoj

Pagita anonco en la Dua Bulteno aŭ la Kongresa Libro atingas tre specialan legantaron: la verajn aktivulojn de la Movado, kiuj kutimas viziti kongresojn. La tarifo por pagitaj anoncoj en la Dua Bulteno kaj Kongresa Libro de Ateno estas ĵus fiksita. La prezo de tutpaĝa anonco en la Dua Bulteno aŭ en la Kongresa Libro estas 162,— guldenoj; por duona paĝo 97,— gld.; por kvarona paĝo 57,— gld. Tutpaĝa anonco sur interna kovrila paĝo kostas 400,— gld. kaj sur ekstera (lasta) kovrilpaĝo 800,— gld. Mendoj estu adresitaj al la konstanta adreso en Roterdamo.

SUBTENU



la 61an
Universalan Kongreson
de Esperanto, uzante sur
viaj korespondaĵoj la
allogan trikoloran
glumarkon!
100 markoj kostas,
inkl. sendokostojn,
5,50 gld. (por
Nederlando 6,— gld.).
Mendu ĉe UEA.

Bonaj loĝkondiĉoj en Ateno

Kongresanoj, kiujn ŝokis la altaj restadkosto en Kopenhago ĉi-jare, sentos agrablan finan kontraston en Ateno. La greka ĉefurbo estas plena de restoracioj, kie oni povas manĝi rapide, bonguste kaj malmultekoste. Pli grave, la hotelkostoj estas ĝenerale modera, kaj LKK disponas pri granda nombro da unupersonaj ĉambroj en la studenta domo de la Universitato de Ateno — tiu sama domo, kiun tiel laŭdis la partoprenantoj de la Postkongreso en 1973. Ĉiuj ĉambroj havas telefonon kaj balkonon, la prezo estas malalta, kaj la domo situas en tre agrabla kvartalo (Zografu). Mendilo kun detalaj prezoj aperos en la Dua Bulteno.

Karavanoj en preparo

Jam dum la 60a UK en Kopenhago estis anoncita skandinavia karavano, kiun organizas la ĉi-jara LKK-prezidanto Gustav Kühlmann. La vojaĝo inkluzivos kelktagan viziton al Istambulo. Detalojn donas: s-ro G. Kühlmann, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Flugkaravanon preparas ankaŭ Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britujo. Du malsamajn karavanvojaĝojn el la beneluksaj landoj preparas la agentejo Blue-Air kunlabore kun Internacia Esperanto-Instituto. Ankaŭ la tradiciaj japanaj karavanoj ne mankos en la fina listo.

Landaj kongresperantoj

Por faciligi la laboron de la centraj organizantoj, la aliĝantoj estas petataj kiel eble plej multe utiligi la servojn de la landaj perantoj por alsendo de aliĝiloj kaj kotizoj. Estas nomita nova peranto por FR Germanujo: s-ino Margarete Klünder, Schützenstr. 13, D-4430 Burgsteinfurt; konto n-ro 44 0 1329 ĉe Deutsche Bank AG, Filiale Burgsteinfurt. Ŝi anstataŭas s-ron Pickel, al kiu ni dankas pro la multjara servo. Aliĝantoj el Greklando povas sendi la aliĝilon kaj kotizon rekte al la adreso de LKK; bankkonto: n-ro 482278, je la nomo de la 61a Universala Kongreso de Esperanto, ĉe la banko Ethniki Trapeza tis Ellados, Eolu 86, Athinai.

Pagu la ĝustan sumon

Por rapidigi la proceduron en la kongresa akceptejo kaj por redukti la laboron en la Centra Oficejo, ekde la Kongreso en Ateno, la kongresanoj ne plu havos personajn kongresajn kontojn. Tio signifas, ke ili ne plu ricevos monon nek estos petitaj pagi ŝuldojn en la kongresejo. Ĉiu aliĝo aŭ mendo (de loĝado, ekskursoj k.s.) devos esti pagita per la ĝusta monsumo. Nesufiĉa pago signifos, ke la aliĝo aŭ mendo simple restos netraktita, ĝis venos kompletiga pago. Troa pago estos tuj repagita, minus la kostoj. Tial ni insiste petas la kongresanojn aranĝi ĝustajn transpagojn.

Statistiko

Ĝis la fino de septembro aliĝis 164 personoj.



Dank' al intensa reklamado kaj vigla aktivado de siaj gvidantoj, la Esperantista Kulturdomo KASTELO GRESILLON en Francio logas ĉiam pli kaj pli da gastoj. Nia foto montras parton de la partoprenantoj en ĉi-someraj aranĝoj.

Svislando

- Por la 19a fojo okazos en Adelboden esperantista skiferio. En la programo troviĝas ankaŭ skikursoj por komencantoj kaj spertuloj, komunaj ekskursoj, prelegoj, diskutoj, festoj, ludoj ktp. Pri la aranĝo, kiu okazos inter la 26a de decembro ĉi-jare kaj la 5a de januaro 1976, petu pliajn informojn ĉe: Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 621, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Soveta Unio

- La centra soveta ĵurnalo *Izvestia* antaŭ nelonge publikigis grandan artikolon de V. Letov sub la titolo "Sagaca koro". Temas pri la lastaj laborjaroj de la fama blinda Esperanto-poeto Vasilij Eroŝenko. Esperanto, kiu ludis gravan rolon en lia vivo, estas menciita kelkfoje en la artikolo.

Singapuro

- En la ĉinlingva ĵurnalo *Sincoŭ ĵirpaŭ* (eldonkvanto 200 000 ekz.) aperis la 13an de aŭgusto longa artikolo pri Esperanto kaj d-ro Zamenhof. La artikolon verkis s-ro Hongi Liao, unu el malmultaj UEA-membroj en tiu mondparto.

Kolombio

- En la kolombia urbo Medellín verŝajne troviĝas unu el la plej agemaj Esperanto-rondoj en Sud-Ameriko (v. ankaŭ nian januaran numeron, p.2). Ŝajnas, ke dum la lastaj jaroj kun Esperanto tie konatiĝis pluraj centoj da homoj, ĉefe studentoj en pluraj universitatoj de la urbo.

Antaŭ kelka tempo en Medellín fondiĝis regiona organizaĵo sub la nomo Antiokia Esperanto-Ligo, kun prof. Manuel Angel M. kiel prezidanto. La nova organizaĵo bonvenigos ĉian sendaĵon de informa aŭ lernomaterialo, samkiel E-librojn por kreiganta biblioteko. Kunhelpu: Antiokia Esperanto-Ligo, Kesto Aerpoŝta 52426, Medellín, Kolombio.

Irano

- Unu el la plej prestiĝaj periodaĵoj de la lando, la kvaronjara kultura revuo *Daneshkadeh*, kiun eldonas

Eli Urbanová, el Prago, Ĉeĥoslovakio, ne nur juĝas literaturaĵojn en la Belartaj Konkursoj de UEA, sed ankaŭ multe aktivas kiel instruanto de Esperanto. Nia foto montras unu el ŝiaj Esperanto-rondetoj en la ĉeĥoslovaka ĉefurbo.



la kultura fako de la Universitato en Teherano, en sia dua ĉi-jara kajero aperigis 52-paĝan studon pri Esperanto. Sen konoj pri la persa lingvo oni povas nur supozi, ke la studo traktis la Internacian Lingvon favore, des pli, ke ĝin verkis d-ro Zamani, profesoro en la Universitato de Teherano, esperantisto kaj UEA-membro.

Ĉilio

- Meze de julio ĉi-jare, d-ro Hans Michael Maitzen (kiu pro profesia laboro ofte restadas en Ĉilio) parolis en la Teknika Ŝtata Universitato de Santiago pri la temo "La monda lingvo-problemo kaj Esperanto". La prelegon interpretis el Esperanto en la hispanan loka UEA-delegito en Santiago Ivan Mättig C.

FR Germanio

- Laŭ decido de la ĉi-jara ĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio, en septembro aperis la unua numero de *Esperanto en FR Germanio*, oficiala bulteno de GEA. La nova periodaĵo aperos kvarfoje jare kaj celas "doni al la membraro la oficialajn informojn kaj aliajn sciigojn taŭgajn por plifortigi la kontaktojn interne de la asocio".

Informado

- En eldonkvanto de 52 000 ekz., komence de septembro aperis speciala numero de la svedlingva informa periodaĵo *Esperantonytt*. Sur ok grandformataj paĝoj la gazeto enhavas intervjuojn kun gejunuloj, kiuj partoprenis la TEJO-Kongreson en Fredericia, artikolon pri Esperanta literaturo kaj tekstojn pri UEA kaj la sveda Esperanto-movado. Tutan paĝon okupas artikolo pri persekutoj kontraŭ Esperanto. Pluraj mallongaj artikoloj temas pri aktualaĵoj el la Movado, ekz. pri la ĉi-jara UK. La gazeto distribuiĝas senpage kaj jam la tuta eldonkvanto estas mendita de la svedaj E-klubo. Ĉi tiu numero de *Esperantonytt* estas presita sur ordinara ĵurnala papero, kio ebligis malaltan prezon kaj siavice ankaŭ la nekutime grandan eldonkvanton.

Geografio

- Prof. David Armand (Mal. Kaluĵskaja 12, kv.24, SU-117071 Moskvo, Soveta Unio) alvokas ĉiujn geografojn-esperantistojn esprimi sian deziron kunlabori en organizota Geografia Sekcio de ISAE. Se montriĝos sufiĉe da intereso pri la nova organizaĵo, ĝi interalie planas okupiĝi ankaŭ pri kompilado de geografia terminaro, ordigo de la transskribo de geografiaj nomoj ktp.

Scienco

- Budapeŝta Informilo*, interesa kaj regule aperanta monata revuo de la Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA, al sia julia numero ĉi-jare aldonis suplementan kajeron de *Sciencaj komunikaĵoj*. Sur 48 paĝoj de tiu suplemento aperis pli ol 20 kontribuoj pri biologio, medicino, krimologio, tekniko, lingvistiko ktp.

Terminaroj

- Internacia Komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj*, aperinta pasintjare en 3000 ekzempleroj, montriĝis unu el la plej bone venditaj fakaj terminaroj. La eldonejo jam fine de la pasinta jaro reprenis la libron kaj ankaŭ tiu nova eldonkvanto baldaŭ elĉerpigos. Estas interese, ke plej multaj ekzempleroj vendiĝis en la landoj de Benelukso (900), Britio (600) kaj FR Germanio (500).

Kursoj

- Someraj Universitataj Kursoj, kies du sesioj okazis en 1972 kaj 1974, anoncas la okazigon de la tria sesio en aŭgusto 1976. Dum la unuaj du sesioj okazis en Lieĝo, lige al la venontjaraj kursoj oni mencias ankaŭ la alian belgan urbon – Antverpeno – kiel ĝian scenejon.

Universitatoj

- Jam dum pluraj jaroj Esperanto estas instruata en la Universitato de Ceará en Brazilo. Ankaŭ la nova rektoro de la Universitato, d-ro Pedro Teixeira Barrosa subtenas la instruadon de la Internacia Lingvo. Tamen, bonvenus skribaj apogoj, kiujn oni adresu al: Rektoro, Federacia Universitato de Ceará, BR-60 000 Fortaleza, Ceará, Brazilo.

Persone



Cseh

- La 12an de septembro 1975 sian 80an datrevenon festis Andreo Cseh, jam delonge legendiginta kaj la plej sukcesa instruanto de la Internacia Lingvo, verŝajne en ĝia tuta historio. Al la modesta festo (tiel petis la jubileanto) venis ankaŭ reprezentantoj de Internacia Esperanto-Instituto, kies kunfondinto kaj plurjardeka animo estis Andreo Cseh, kaj de la Centra Oficejo de UEA, kies honora membro s-ro Cseh (sur la foto) estas.

Prelegoj

- Kiel kutime dum la lastaj jaroj (v. nian revuon, majo 1975, p.86), Esperanto-Grupo "La Verda Stelo" en Antverpeno, Belgio, ankaŭ ĉi-jare organizas sian jam konatan vintran prelegciklon. Temas pri serio de kvin prelegoj, kiuj okazos ĉiun unuan vendredon de novembro 1975 ĝis marto 1976. Ĉi tiun fojon la serio havas komunan trajton, kies celo estas prezenti al la antverpena publiko kvin landojn kaj iliajn kulturojn. Temos pri Danlando, Kanado, Usono, Portugalio kaj Japanio.

Lernolibroj

- En Malto ĵus aperis 26-paĝa, grandformata, stencilita Esperanto-kurso de C. Mallia, konata ankaŭ kiel gajninto de premioj en internaciaj literaturaj konkursoj en Esperanto. La nova lernilo verŝajne estas la unua provo verki lernolibron de Esperanto en la malta lingvo.

Kolker

- La novelektita komitatano de UEA Boris Kolker (Soveta Unio) faris antaŭ kelka tempo vojaĝon tra Rumanio kaj tie renkontiĝis kun membroj de la Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato. Li krome renkontiĝis ankaŭ kun Esperanto-grupoj en Bukareŝto, Braŝov kaj Predeal.

Markarian

- S-ro Raif Markarian, internacie konata aktivulo sur la lerneja kampo kaj mem lernejestro, akceptis fariĝi prezidanto de la Konsulta Komisiono pri Edukado, kiun formis la Komitato de UEA en siaj kopenhagaj kunsidoj. La sekretario de la Komisiono fariĝis s-ro Germain Pirlot el Belgio.

Miyamoto

- Konata literaturisto kaj unu el la plej elstaraj aktivuloj en la japana Esperanto-movado, Masao Miyamoto, antaŭ nelonge estis nomita kiel lektoro pri la Internacia Lingvo ĉe la Minicipa Universitato de Kobe en Japanio. Tio signifas, ke la universitata Instituto por Fremdlandaj Kulturoj envicigis Esperanton en sia studprogramo.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1975, p. 64-65. Mallongigoj:

I = informoj, P = parolado, K = kurso.

Esperanto-Fako, CH-3000 Bern
15, Svislando.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90 (6135 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 31.01m (9675 kHz). I. P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz). I. P.

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 kHz), 16.85m (17800 kHz). I. P. ORF Esperanto, P.O.B. 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
08.30-08.55 Sofio, 49.42m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgario.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 30m, 25m, 19m. I.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Ital.
20.05-20.30 Sofio, 5061m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.82m (15140 kHz), 19.60m (15305 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio,

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
16.40-16.55 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakio.
17.35-17.45 Vieno, 203m (1475 kHz). P. (Ĉiun kvaran sinsekvan mardon: la 22an de julio, la 19an de aŭgusto ktp.).

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).
20.45-21.00 Sabadell, 203m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I. K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

16.25-16.40 Bratislavo, kiel marde.
21.45-21.55 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz). P. (d-ro A. Baur).

Vendrede

20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m, 25m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155

kHz), 16.87m (17780 kHz). I.P. 20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz); 2) dum la svedlingva programo marde de la 15.00 ĝis la 15.30 per ondoj 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz); 3) dum la danlingva programo dimanĉe de la 20.00 ĝis la 20.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz).

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislavo (tamen aŭdebla en la apudaj landlimaj regionoj), Gdańsk (mod. frekv.), Muritiba, Sabadell.

b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Sofio, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vieno (203m, 48.74m), Zagrebo.

Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.64m, 16.85m en la sud-orienta Azio).

ĉ) Stacio aŭdebla en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (25.60m, 25.27m, 19.82m, 19.60m, 16.83m, 13.94m).

Tio ĉi estas nur ĝenerala skizo pri la aŭdebleco, kiu dependas ankaŭ de la modelo de la ricevilo, de la atmosferaj kondiĉoj kaj aliaj lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

N-ro 492, 1975 08 31

SOCIETO ZAMENHOF 1975

SVED: 141 Ingemar Nordin. BRIT: 142 P.S. MacDonald. US: 143 Hyman Ledeen; 144 James E. Lieberman. NED: 145 A. Kriek. FRANC: 146 R. Vinard. BRIT: 147 Wilfrid G. Atkinson. US: 148 W.D. O'Ryan Jr; 149 N.J. Campbell. KAN: 150 Ph.W. Trubey. GREKL: 151 Anastasia K. Eliopulu; 152 Kimon G. Eliopulos; 153 Georgo Eliopulos. SVED: 154 E. Rytenberg. AŬSTRAL: 155 Tim Einihovici. FINN: 156 Liisi Oterma. FRG: 157 W.Th. Oeste. US: 158 Alberta S. Casey. FRG: 159 R. Schulz. DANL: 160 Torben Kehlet. FINN: 161 Lauri Vuolo.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975 12 15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BRIT: Reg. C.W. Bedford, D kaj FD Appleby; Geoffrey King, D kaj FD Enfield; Eva Goulding, D Freckleton; Hugh Martin, VD Glasgow; E. Robert Penny, D Malvern; Neil Salvesen, D Manchester; Colin Hewitt, D Newtownards; G.A. Hartley, FD Sheffield; Ph. Willey, D kaj FD Portishead; Kable Singh, JD Southampton; G. Wood, D Wakefield. ĈEĤOSL: F. Rytíř, D Tabor. FRANC: J.P. Boulet, D Cournon d' Auvergne; P. Cavelan, VD Toulon. FRG: P. Löffelsend, D Bergisch-Gladbach, D kaj FD Köln; J. Riedl, D Esslingen; Ch. Roether, D Michelstadt; G. Peek, D kaj FD Nienburg; R. Kvašňák, D kaj FD Offenbach. HUNG: S. Szénási, FD Eger; M. Dumitrás, D kaj FD Orosháza; R. Halász, VD Salgótarján; M. Csikós, FD Szeged. ITAL: R. Pagliarini, D kaj FD, R. Fantini, VD kaj FD, B. Bendini, FD Cesena; N. Giani kaj P. V. Orlandini, FDoj Grosseto; A. De Salvo, FD Roma. JUG: Boris Ilov, D kaj FD Kavadarci; R. Stojanoski, D kaj FD Prilep. KUBO: A.J. Santana López, D Camagüey. NED: Jacoba Vooren-Koogje, D Krommenie; Piet Buijsters, FD Nijmegen. SVED: E.

Rytenberg, D Bergsbrunna; Elly Persson, D kaj FD Trelleborg. US: William R. Harmon, D kaj FD El Cerrito; R. Morey, FD Zanesville.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1975:

AŬSTRAL: Bowen. AŬSTR: Wien, FD (PTT). BRAZ: Belém; Belo Horizonte, D, JD, FDoj (juro, religio: katolikismo); Campos; Criciúma; Curitiba, D; Jaú; Potirendaba; Resende; Ribeirão Preto; Salvador, FDoj (komerco, radioamatorismo); São Mateus do Sul; Viçosa. BRIT: Arnside; Blackburn; Chorley; Cosby; Folkestone; Huddersfield; Leigh-on-Sea; Llandudno; Manchester; Stoke-on-Trent, VD kaj FDoj (aŭtomobilismo, edukado); Stonehouse; Tavistock; Worcester; Wrexham, D. BULG: Goverdarci; Plovdiv; Sofia, FDoj (PTT, radio/televido). ĈEĤOSL: Bratislava, FD (sporto); Brno, FD (arkitekturo); Karviná; Kopřivnice; Liberec, VD; Malacky; Plzeň; Poděbrady, D; Praha, FD (muziko); Prievidza; Stonava; Těchonín; Znojmo. DANL: Aarhus, FD (virinaj aferoj); Hinnerup; København, FD (maristaj aferoj); Nykøbing F; Strib; Viborg. FINN: Jyväskylä, FD (elektro-kaj veldo-tekniko); Kuopio, D kaj FDoj (SOS-aŭtoservo, turismo). FRANC: Cannes, D; Saint-Etienne, VD (Tissot); Sartrouville, FD (arbar-kulturo). FRG: Krefeld; Rüsselsheim. HISP: Barcelona, FDoj (industrio, polico); Bilbao, JD; Denia; La Laguna, VD; Telde. ISR: Hadera, FD (ĵurnalismo); Kirjat Jam; Kirjat Tivon, D. ITAL: Bologna, VD; Cagliari; Catania; Ghilarza; Mantova, FD (elektrotekniko); Marina di Massa; Trofarello; Torino, FD (mekaniko); Vicenza, D, FD (fervojo). JAP: Kakegawa; Nagoya, D; Tokyo, FD (transporto kaj komerco). JUG: Kamnik; Skopje, FD (medicino); Svetozarevo; Trojstvo; Zadar; Zagreb, FDoj (radio, sporto); Zrenjanin. KUBO: Puerto Padre. LUKS: Dudelange. MALAG. RESP: Tananarive, D, JD, FD (bankaj aferoj). MALTO: Vittoriosa. NED: Alkmaar, FDoj (biologio, skoltismo); Arnhem, FD

(mondorganizo de kamparaninoj); Leeuwarden, VD, FD (muziko); Tilburg, FD; Velp. NORV: Trondheim, FD (turismo). NOV-ZEL: Tauranga. POLL: Dzierżonów; Kłodzko; Kraków, FD (ĵurnalismo); Lublin, FD (lingvistiko); Szczecin; Tomaszów-Maz. PORT: Lisboa, FD (komerco). SVED: Jönköping, FD (dentistaj aferoj); Kumla; Malmö, VD (Sjöblom); Nässjö; Nybro, VD, FD (filatelo); Trelleborg, VD; Vänersborg; Vetlanda. SVISL: Prangins. US: Alameda; Amarillo; Bell Gardens; Brookfield; Chicago, FD (medicino); Mattoon. VJETN. RESP: Sajgono, D.

KOREKTO DE JARLIBRO 1975

En Jarlibro 1975, p.302, la adreso de Mongola Esperanto-Unuiĝo pro eraro aperis sub la rubriko "Sovet-Unio". Ĝi kompreneble devus aperi sub aparta rubriko "Mongolujo" sur la paĝo 265. Ni pardonpetas al la koncernaj organizaĵoj pro la intermikso.

KOTIZPERADO POR NORVEGUJO

Post la forpaso de la multjara ĉef-delegito de UEA por Norvegujo, s-ro Alfred Skyberg (v. en la rubriko "Nekrologoj"), la taskojn de landa oficejo de UEA provizore transprenis Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo 1 (Telefono: 02-691439).

DONACOJ 1975 (Gld.)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: Robert Moerbeek 100,-. Usono: William D. O'Ryan, filo, 18,50. Sumo ĝisnuna 710,39.

FONDAĴO CANUTO: Islando: Karl Sigurdsson 12,-. Italio: Enzo Guernieri 19,-. Kanado: H.C. Braver 5,88; W.D.B. Hackett 50,-. Nederlando: F. Zeiler 50,-. Sumo ĝisnuna 3998,17.

ĜENERALA KASO: Anonime: 2060,-. Aŭstralio: R. Carruthers 30,70. Belgio: Blanche Geers 70,-; J. Henquinoz 7,17; Germain Pirlot 5,49. Britio: Memore al s-ro F. Parker 98,19. Francio: René Lemaire 30,-; Eloi Thiollière 29,98. FR Germanio: Ulrich Hoffman 4,60; Bruno Vogelmann 21,89. Israelo: Dvora Šor 17,60. Italio: Cesare Arieti 50,-. Japanio: Hideo Shinoda (por la Societo Zamenhof) 811,95; Yoshiki Tatsumi 108,50. Nederlando: J.M. v.d. Hoeven 3,81; Robert Moerbeek 10,-; H. Veenstra 281,80; J. Verlinde 2,82. Usono: Jonathan Cole 12,50. Sumo ĝisnuna 9960,93.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Kotizo-tabelo 1976

Valuto	MJ	MA MA-K	MSZ	J-MJ	J-MA SA	K-to	Pat.A	AerR
£ brita	4,30	8,60	25,80	2,15	6,45	2,27	4,54	—
rando SA	7,00	14,00	42,00	3,50	10,50	3,70	7,40	3,10
\$ aŭstralia	7,50	15,00	45,00	3,75	11,25	3,96	7,72	4,70
\$ novzel.	9,00	18,00	54,00	4,50	13,50	4,75	9,50	4,70
\$ US/kan.	9,50	19,00	57,00	4,75	14,25	5,00	10,00	3,15
guld./DM	25,00	50,00	150,00	12,50	37,50*	13,00*	26,00	—
fr. svisa	28	56	168	14	42	15	30	—
finna mark.	34	68	204	17	51	18	36	—
bs. venez.	38	76	228	19	57	20	40	21
krono sved.	40	80	240	20	60	21	42	—
irpk	42	84	252	21	63	22	44	—
franko fr.	44	88	264	22	66	23	46	—
krono norv.	50	100	300	25	75	26	52	—
krono dana	58	116	348	29	87	31	62	—
£ israela	60	120	360	30	90	32	64	13
kruzejro	75	150	450	37	112	39	78	27
peso arg.	108	216	648	54	162	57	114	60
peso meks.	120	240	720	60	180	63	126	40
dinaro/kr.ĉ.	150	300	900	75	225	78	157	—
ŝilingo	180	360	1080	90	270	95	190	—
esk. portug.	220	440	1320	110	330	115	230	—
draĥmo	260	520	1560	130	390	140	280	—
franko belg.	360	720	2160	180	540	190	380	—
solo perua	480	960	2880	240	720	250	500	270
peseto hisp.	520	1040	3120	260	780	270	540	—
eno japana	2900	5800	17400	1450	4350	1505	3010	1200
liro itala	6000	12000	36000	3000	9000	3115	6230	—
peso urugv.	12500	25000	75000	6250	18750	6500	13000	6900

* Por Nederlando aldoniĝas al la prezoj de simplaj abonoj por la revuoj *Esperanto* kaj *Kontakto* la enlanda imposto de 4% kaj ili do respektive kostas 39,00 kaj 13,52 gld.

KLARIGOJ: MJ = Membro kun Jarlibro; MA = Membro-Abonanto; MA-K = Membro-Abonanto kun *Kontakto*; MSZ = Membro de Societo Zamenhof; J-MJ = Juna Membro kun Jarlibro; J-MA = Juna Membro-Abonanto; SA = Simpla Abonanto de *Esperanto*; K-to = Abonanto de *Kontakto*; Pat.A = Patrono A de TEJO; AerR = Aerpoŝta ekspedado de la revuo *Esperanto*.

NECESAJ AKORDIGOJ POR KELKAJ LANDOJ

KIEL ATENTAJ LEGANTOJ de la revuo kaj de eventualaj cirkuleroj de la ĉefdelegitoj/perantoj jam rimarkis, la kotizoj de UEA por 1976 restis la samaj kiel por 1975. Tio malgraŭ la fakto, ke en Nederlando la kostoj, precipe de presado kaj de afranko, kaj la devigaj minimumaj salajroj denove plialtiĝis.

La baza kotizo — tio estas tiu por membro-abonanto (MA) — do restis por 1976 same 50,— nederlandaj guldenoj kaj la kotizoj por la aliaj membro-kategorioj konservis la saman proporcion rilate al la baza kotizo. Tamen, necesis atenti alian aferon: La kurzo de pluraj valutoj rilate la guldenon restis proksimume sama, sed en kelkaj landoj okazis oficiala devaluto de la nacia mono aŭ la kurzo dume tiom falis, ke necesis iom akordigi la kotizojn en la valutoj de tiaj landoj. La pro tiuj kurzfaloj ŝanĝitajn kotizojn vi trovas en la ĉi-supra tabelo. Ili rilatas al jenaj landoj: Aŭstralio, Britio, Brazilo, Israelo, Italio, Japanio, Jugoslavio kaj Nov-Zelando.

La novaj kotizoj — en la menciitaj landoj — plene ekvalidos nur ekde la 1-a de januaro 1976. Tio signifas, ke ĝis la fino de 1975 ankoraŭ eblos ankaŭ en tiuj landoj pagi por 1976 laŭ la tarifo, kiu validis por ĉi tiu jaro. Sed, ni ripetu, ekde la 1-a de januaro 1976 validos nur la kotizoj de la ĉi-supra tabelo. Indas do rapidi rilate la fruan pagon de via kotizo por la jaro 1976!

Nekrologoj

BRUNO MIGLIORINI

En Florenco, Italio, la 18an de junio forpasis prof. d-ro Bruno Migliorini (1896 - 1975), konata itala lingvisto kaj eminenta figuro en la Esperantomovado. Lerninte la Internacian Lingvon jam en 1912, li samjare fondis E-grupon en Rovigo kaj kunfondis grupojn en Venecio (1914) kaj Romo (1921). Li prelegis en la Someraj Universitatoj en la kadro de la 22a UK (1930, Oksfordo) kaj 24a UK (1932, Parizo). Krom multegaj nacilingvaj verkoj — li verkis, inter alie, historion de la itala lingvo kaj ĉefredaktis grandan italan enciklopedion — prof. B. Migliorini verkis E-gramatikon por italoj (*Manuale di Esperanto in dieci lezioni*, 1923) kaj kune kun sia frato Elio kompilis tre sukcesan internacian legolibron (*Esperanta legolibro*, 1925); en 1921 aperis lia libro *Anekdotoj pri Dante*, reeldonita en 1956. En pluraj periodaĵoj aperis liaj artikoloj pri ĝenerala lingvistiko, pri Esperanto-vortoj kaj kontraŭ aliaj planlingvaj projektoj. En 1955 prof. Migliorini estis membro de la Honora Komitato de la 40a UK en Bologna. Ĝis sia morto prof. Migliorini estis membro de la redakta komitato de *La Monda Lingvo-Problemo*, ekde ties unua numero.

ALFRED SKYBERG

La ĉefdelegito de UEA en Norvegio, s-ro Alfred Skyberg (1910 - 1975), forpasis la 6an de septembro. Lerninte Esperanton jam en 1934, li ĉiam restis aktiva en la Movado kaj, krom la taskoj por UEA, plenumis ankaŭ multan laboron por Norvega Esperantista Ligo, pro kio li ricevis apartan rekonon. Interalie, li prezidis la estraron de la norvega Eldonejo Esperanto.

F. MUELLER-SORAU

En Aŭstralio, kie li vivis dum la lastaj 20 jaroj, forpasis la 13an de julio s-ro Fritz Mueller-Sorau (1906 - 1975), germandevena, vivinta ankaŭ en Britio kaj Kanado. Li estis tre aktiva en la loka movado en Sidnejo kaj dum multaj jaroj estis ankaŭ membro de UEA.

OSKAR BERMAN

En Hadera, Israelo, la 6an de julio forpasis s-ro Oskar Berman (1891 -

1975), iama vic-ĉefdelegito de UEA, multjare servinta ankaŭ kiel fakdelegito pri ĵurnalismo. Li estis membro de UEA ekde 1939.

HASAN KOCAMAN

Unu el malmultaj sed longtempaj membroj de UEA en Turkio, s-ro Hasan Kocaman (1907 - 1975), de-



legito en Istambulo dum la lastaj 25 jaroj, forpasis la 23an de aprilo. Li lernis Esperanton antaŭ 45 jaroj.

OTMAR AVSEC

Esperantisto dum la lastaj 50 jaroj, iama ĝenerala sekretario de Jugoslavia Esperanto-Federacio (nun JEL),

vortaristo kaj konata aktivulo en la jugoslavia movado, s-ro Otmar Avsec (1907 - 1975), forpasis en Ljubljana la 20an de aŭgusto ĉi-jare.

HERMANN WAGNER

En Fürth, FR Germanio, la 17an de julio forpasis s-ro Hermann Wagner (1898 - 1975), membro de UEA ekde 1947, dum la lastaj 20 jaroj regule en la kategorio de membro-subtenanto. Li estis ankaŭ delegito kaj fakdelegito.

JAKOB TELLING

La 14an de aŭgusto, en Rotterdam, Nederlando, forpasis s-ro Jakob Telling (1897 - 1975), dumviva membro kaj iama ĉefdelegito de UEA en Nederlando. Li prezidis lokan E-grupon de poŝtistoj.

PRISKA HAAS

En Maribor, Jugoslavio, la 20an de julio mortis s-ino Priska Haas (1888 - 1975), kiu esperantistiĝis jam en 1911, kaj en 1913 partoprenis la 9an UK. Ŝia aktiveco plektiĝis kun tiu de d-ro Henriko Haas (ŝia edzo), fondinto de la loka E-grupo (1910) kaj unu el la pioniroj de la jugoslavia movado. Ŝi kunorganizis landan

kongreson, gvidis multajn kursojn kaj longtempe estis delegito kaj fakdelegito de UEA.

LUISE TRESSEL

S-ino Luise Tressel (1888 - 1975), vidvino de la iama delegito de UEA en Munkeno, FR Germanio (kiu sian delegitan funkcion plenumis dum 53 jaroj), forpasis la 9an de julio. Ankaŭ s-ino Tressel estis dum multaj jaroj aktiva en la Movado kaj mem estis membro de UEA.

LOUIS APCHER

En L' Isle-sur-Sorgue, Francio, la 16an de aŭgusto mortis emerita profesoro Louis Apcher (1898 - 1975), dumviva membro de UEA kaj plenuminto de diversaj taskoj en la delegita reto dum la lastaj 30 jaroj. Li verkis korespondan E-kurson kaj instruis, interalie, en Grésillon.

GIOVANNI BRUNO

La 27an de junio forpasis en Catania, Italio, prof. Giovanni Bruno (1900 - 1975), unu el la gvidantoj de la loka movado kaj entuziasma aktivulo sur la lerneja kampo. Li servis ankaŭ en la delegita reto de UEA.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Plumamikoj alilandaj! Individua prezentservo! Tra la tuta mondo! Ilustritaj internaciaj plumamikec-revuoj! Plilarĝigu viajn horizontojn! Detaloj senpagaj! Skribu hodiaŭ! Five Continents Company Ltd., Waitakere, Nov-Zelando.

Lex d' Oliveyra malsanas kelkajn monatojn (hernio); nun krizo necesigis enhospitaligon. Kvankam li fizike ne povas respondi, li volonte ricevas leterojn. Adreso: Lex d' Oliveyra, Prinses Beatrixoord, Mauritskade 61, Amsterdam, Nederlando.

Pro morto de s-ino Drobny sendu ĉion por La Navigantoj (informpetojn, taskosolvojn ktp. koncerne perkorespondan Bibliokurson) al: Esperanto-Misio, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Ekde januaro 1976 ni bezonos helpon de kapabla kunlaborant(in)o ĉefe (sed ne ekskluzive) por la IBM-kompostmaŝino. Interesiĝo? Grafika Studio Nevan, Poŝtkesto 10100, Rotterdam, Nederlando.

Per magnetofono, 4-traka, mi deziras korespondi tutmonde. Per il. p.k. ni unue interkonsentu. Mi, 58-jara, interesiĝas pri paco kaj politiko. S-ro Gösta Persson, Berzeliusplatsen, S-25230 Helsingborg, Svedujo.

Pluraj gelernantoj de Esperanto-kurso en brazila universitato deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Adreso: Caixa Postal 291 (Ribeira), BR-59 000 Natal (RN), Brazilo.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Sperta esperantisto serĉas seriozan korespondadon kun kolegoj el ĉiuj landoj, ankaŭ ne rifizas komencantojn. Unuan leteron nepre respondos. Daŭrigo dependas de cirkonstancoj, precipe de seriozeco de la korespond-propono. Adreso: V.P. Beškarev, Rezervnaja II, kb. 3, SU-603009 Gorjkij, Soveta Unio.

Kolektanto serĉadas kaj interŝanĝadas biero-subumojn bonstatajn el la tuta mondo. Mi kontraŭdonas ankaŭ p.m. Harry Borchert, Hindenburgstr. 4, D-330 Goslar 2, FR Germanio.

6-8 junaj fraŭlinoj (8-14-jaraj) serĉas sincerajn korespondantinojn el la tuta mondo. Se plaĉas, skribu al: s-ro E. D'Aute-Hooper, 25 Douglas Road, Acocks Green, Birmingham 27, Anglujo.

Por refreŝigi mian Esperanton mi serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Ed. J. Veldhuyzen, Roland Holstlaan 958, Delft-2204, Nederl.

ĈINA ESPERANTA MONATA GAZETO

EL POPOLA ĈINIO

VARBAS ABONANTOJN DE 1976

Abonkotizoj: 1-jara abono 6,00 gld.
2-jara abono 9,00 gld.
3-jara abono 12,00 gld.

(Nederlandanoj bv. aldoni 4% por la enlanda imposto).



Abonu ĉe loka peranto aŭ ĉe: Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
Rotterdam-3002
Nederlando

aŭ rekte ĉe: Esperanta sekcio de
GUOZI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313
Pekino, Ĉinio

ABONREKOMENDO BONVENA

SENPAGAJ SPECIMENOJ AKIREBLAJ LAŬPETE

Ĉe la franca Lazura Bordo, sub sunplena ĉielo, ĉe

HOTEL MIRON ★ N.N.

4 rue Miron — NICE — tel. 93.85.22.68,

kiu jam faris la miron

de pluraj dekoj da esperantistoj,

atendas vin la esperantista familio Llorens

Lifto — Komfortaj ĉambroj kun aŭ sen duŝo —

Telefono en la ĉambroj — Televid-salono



**"ĈIU ESPERANTISTO ĈIAM PORTU
LA ESPERANTAN INSIGNON (NE
MULTAJN, SED UNU)".**
— Principaro de Frostavallen

Bikiniformatan eldonis UEA: diametro
8mm, pinglolo 43 mm; verda, filikeca
stelo sur blanka fono. Prezo: 1,62 gld.
(por Nederlando 1,85) + sendokostoj 10%.

Retoriko restas ĉefverko

Nur lernolibroj
kaj vortaroj spertas
plurajn eldonojn.

RETORIKO

estas escepto:


ĝi jam aperis

EN TRI ELDONOJ!


Mendu ĉe UEA: 25,-
(por Nederl. 26,-) gld.
plus sendokostoj 10%.

"En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla
libro tiel science redaktita, tiel oportune
utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko."

Prof. G. Waringhien



**VI HELPOS AL LA CENTRA OFICEJO,
SE VI ĜUSTATEMPE PAGOS VIAN
KOTIZON POR LA JARO 1976. PAGU
PREFERE AL LA LANDAJ PERANTOJ.**



"ĈIU, kiu iasence konsideras sin serioza esperantisto kaj ne nur periferia hobiisto, povos profiti per studado de **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**; sed precipe tiuj el ni, kiuj deziras: ekzameni aŭ ekzameniĝi; instrui; verki pri Esperanto; maturstile kaj inteligente propagandi pri Esperanto en diversaj medioj, kaj armi sin kontraŭ demandoj, ne nur pri tiuj temoj, pri kiuj ni pro intereso kaj temperamento iom scias, sed pri tiuj temoj, kiuj ne rekte koncernas nin — sed ofte tre koncernas la demandanton."

Marjorie Boulton

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libro servo de UEA.

Ni prezentas KONZOLAN FREZMAŝINON MU-5 KUN ĈEFFUNKCIIGO TRABA de la Ilmaŝinfabriko CSEPEL

La maŝino havas simplan strukturon, kiu ebligas optimuman elformadon ankaŭ laŭ dinamikaj proprecoj, krom ke ĝi garantias maksimuman rigidecon.

La stablo kun la prilaborataĵo moviĝas nur en vertikala kaj laŭlongeca horizontala direktoj, dum en transversa direkto ĝin movas la trabo muntita sur la supra parto de la stativo. En tiu estas lokita la ĉefa funkciigilo, kaj en la antaŭa parto la universala frezkapo, la laborilo.

La ĉefan funkciadon certigas la 16-grada mankluča funkciigilo. La trabo kaj stablo estas horizontalaj; la vertikal-moviĝon certigas la kontinue regulebla kaj al la bobeno senpere aliĝanta *Axem Servalco*-funkciilo per kontinua kurento. La frezkapo estas turnebla ĉirkaŭ ebena angulanta 45 gradojn al la ebena de la stablo kaj estas starigebla, krom la vertikala kaj horizontala bazaj pozicioj, ankaŭ en la spaco. Tio pliigas la universalecon de la maŝino.

La nombron kaj kvaliton de la laboroj fareblaj per la maŝino plimultigas la adapteblaj laboriloj (konustransformiloj, aksostangoj ktp.), krome aliaj akcesoraĵoj (ŝraŭbpremilo, dividpeco ktp.).

La maŝino estas facile manumebla; la povumo kaj la spacaj mezuroj de laboreblecoj estas grandaj rilate al la pezo.

Teknikaj indikoj:

Plenumo de la ĉeffunkciiga motoro	kw	10
Intervalo de turniĝnombroj: 16 gradoj	n/min	45—1400
19 gradoj	n/min	35—2200
Antaŭen-ŝovo en longeca kaj transversa direktoj	I. mm/min	30—1000
	II. mm/min	40—1200
Antaŭen-ŝovo vertikale	I. mm/min	10—300
	II. mm/min	13—400
Rapida movo en longeca kaj transversa direktoj	mm/min	6000
Rapida movo en vertikala direkto	mm/min	2000
Stablo-mezuro	mm	500x1600
Laŭlonga movo de stablo	mm	1200
Vertikala movo de stablo	mm	500
Transversa movo de laborilkapo kaj trabo	mm	650
Ĉefbobena konuso	ISO	50

INFORMA ADRESO:

CSEPEL MÜVEK TRÖSZT

PF. 93, H-1751 BUDAPEST, HUNGARIO

